

# LINGVO INTERNACIA

MONATA GAZETO POR LA LINGVO ESPERANTO.

ELDONATA DE LA KLUBO ESPERANTISTA EN UPPSALA.

<b>Kosto de abono por jaro:</b>	<b>Pago por anoncoj:</b>
kronoj 3,00 = germ. markoj 3,30 =	15 öre = 15 pfenigoj = 20 centimoj =
frankoj 4,25 = rubloj 1,50.	8 kopekoj — por duonpaĝa petitlinio.

Adreso de la redakcio: *Klubo Esperantista, Uppsala, Sverige.* (Svedujo.)

Uppsala.

Majo 1896.

N:o 5.

## De la redakcio.

En la unua artikolo de la pasinta numero ni diris, ke la pligrandigo de la gazeto estas por ni en la nuna tempo neebla. Kiam tiuj ĉi vortoj estis jam presitaj, tute neatendite aperis la eblo pligrandigi la gazeton, kaj la aprila numero estis eldonita jam en iom pli granda amplekso, ol la antaŭaj. La amiko de nia afero, s-ro W. H. Trompeter, transsendis al ni 200 markojn por subteni la gazeton. Kvankam la ricevitaj de ni ĝis nun enspezoj ne kovros kredeble niajn elspezojn malgraŭ la malavara donaco de s-ro A. Z. el Poltava\*), ni decidis tamen uzi la donacon de s-ro Trompeter por pligrandigi ĉiun numeron ĝis la fino de tiu ĉi jaro je 8 paĝoj. Tiamaniere la donacon de s-ro Trompeter ricevos ĉiuj legantoj de la "Lingvo Internacia", amikoj de Esperanto.

La nuna numero havas tamen ne 24, sed 32 paĝojn. La kaŭzon de tiu ĉi pligrandigo la legantoj ekscios el la letero de s-ro Ŝatunovski, presata pli malsupre.

**La redakcio.**



## Literatura konkurso.

La societo Espero, akceptinte en la kunveno de 15 marto la proponon de sia membro, s-ro V. Ŝmurlo, decidis organizi internacian literaturan konkurson en la lingvo Esperanto. — La kondiĉoj de la konkurso estas sekvantaj:

I. Al la juĝanta komitato povas esti sendataj:

a) teatra peco, unu- aŭ duakta, por malgranda sceno, verkita en lingvo Esperanto, aŭ tradukita el lingvo nacia;

b) originala rakonto (10—16 paĝoj), verkita en Esperanto;

c) traduko de ia grava verko poezia aŭ scienca.

\*) Vidu N:o 1, paĝon 5-an.

II. Tri verkoj estos honoritaj per diplomoj kaj premioj. — Unua premio estas ora ĵetono, la dua — argenta ĵetono kaj la tria — bronza ĵetono. Tri sekvantaj verkoj estos honoritaj per diplomoj. La elektitaj verkoj restos al la societo Espero kun la rajto de eldono.

III. La manuskriptoj devas esti sendataj al la juĝanta komitato kun devizoj, sen nomoj de aŭtoroj. La nomoj kun devizoj devas esti enmetitaj en fermitaj kovertoj, aldonitaj al la manuskriptoj.

IV. La manuskriptoj estos akceptataj de la juĝanta komitato ĝis la 1-a decembro 1896 (novastile).

V. El la alsendotaj manuskriptoj la komitato elektos nur manuskriptojn, indajn de premio, laŭ ĝia opinio. La rezultatoj de la konkurso estos publikitaj en la "Lingvo Internacia", en la unua numero de l' jaro 1897. — La manuskriptoj, kiuj ne ricevos premion, ne estos nomitaj.

VI. La juĝanta komitato estos prezentata per la sekvantaj personoj: *A. S. Kofman, V. Gernet, S. Ŝatunovski.*

VII. La manuskriptojn oni petas sendi laŭ la adreso:

*V. Gernet. Reméslenaja 11, Odessa, Rusujo.*

Prezidanto: *F. de Kanaloŝŝy-Lefler.* Sekretario: *J. Beker.*

### De la juĝanta komitato.

— La juĝanta komitato opinias necesa turni la atenton de l' sinjoroj partoprenontaj en la konkurso, ke aljuĝante la premiojn ĝi estos gvidata de la sekvantaj principoj:

a) Verkoj originalaj, interesaj laŭ la enhavo, havos preferon kontraŭ la tradukitaj:


b) La premioj ne devas esti aljuĝataj al la verkoj, precipe tradukitaj, skribitaj en lingvo neregula kaj en malbona stilo.

La aŭtoroj aŭ tradukistoj de l' verkoj sciencaj devas turni specialan atenton al la terminologio scienca, kiun ili uzos. La sciencaj terminoj devas esti aŭ formitaj el la elementoj, kiuj sin trovas en la "Universala Vortaro" de d-ro Zamenhof (verko N:o 64), aŭ elektitaj inter la vortoj internaciaj, kompreneblaj por ĉiuj nacioj de l' Eŭropo.

*A. Kofman,*

*V. Gernet,*

*S. Ŝatunovski.*



## El Francujo.

### Esperantisto kaj filatelo.

En la lasta numero de la "Lingvo internacia", s-ro de Beaufront, anoncanta la velocipedan terminaron, kiun pretigas s-ro Langlet, aludis pri mia intenco fari la specialan terminaron de la filatelistoj. Hodiaŭ mi deziras re-paroli iom pli longe al niaj amikoj pri tiu intenco, el kiu mi esperas fari post nemulte da tempo veran efektivaĵon.

Sendube tiu ideo mirigos multajn legantojn de la "Lingvo". La kolektantoj de poŝtaj markoj estas efektive la plej malfeliĉaj inter la kolektantoj. Estu amanto de malnovaj rustaj moneroj, de rompitaĵoj teleroj, de senformaj antikvaĵoj: bone: ne sole vi neniel perdas la estimon de via ĉirkaŭaĵo, sed eĉ vi elvokas respektan miron, vi fariĝas preskaŭ scienculo. Sed ne risku

vin konfesi, ke vi kolektas poŝtajn markojn: baldaŭ oni diros per kompata tono, ke via inteligento malaltigis; tiu malbenita kolekto, sur kiu sendube falis iam la dia kolero, estas rigardata kiel speco de frenezo! Unu afero konsolas min: nome, ke ni estas multaj frenezuloj frapitaj de la sama malsano, kaj ke inter ili troviĝas kelkaj el la plej konataj, eĉ mi diros el la plej gloraj el niaj amikoj esperantistoj: nenium mi volas nomi, ilia reputacio povus per tio suferi! sed ĉar mi havas nenian reputacion por perdi, mi senhonte konfesas, ke mi estas adepto de tiu scienco, kiu ricevis sub ĉiuj ĉieloj de l' mondo la nomon: filatelo.

Se tiu sciigo pri mia persono ne interesas la esperantistojn, ili ne povos seninterese fari kun mi la rimarkon, ke miaj multegaj kolegoj-filatelistoj havas plej diversan korespondadon kun ĉiunaciaj personoj; la internacia korespondado estas la fundamento mem de ilia kolekto; tial ili sentas, multe pli ol ceteraj, la bezonon de reciproka kompreniĝo, kaj ili ĝin sentas tiel bone, ke la plimulto aldonas al lia patruja idiomo la lernadon de du aŭ tri aliaj lingvoj. Ili do povas estimi la utilecon kaj praktikecon de nia lingvo; sed per tio, estas necese, ke ili ĝin konu. Mi ĉiam profitis okazojn prezenti ĝin en la filatelistaro, kaj mi ofte sukcesis. Sed mi pensas, ke mi vere konvinkos ilin sole kiam la perfekta taŭgeco de Esperanto por tia korespondado fariĝos plene videbla, nedisputeble klara, kiam ĝi donos al ili la tradukon de iliaj specialaj vortoj kaj frazoj, kiam unuvorte Esperanto estos tute alpretigita al iliaj bezonoj. Por tiu celo, konvinkita ke mia laboro ne estos senfrukta, mi hodiaŭ finigas la verkadon de "speciala terminaro" por la filatelistoj.

Tiu libreto enhavos: 1) duoblan teĥnikan vortaron (franca-esperanta kaj esperanta-franca), en kiu la kolektantoj trovos ĉiujn vortojn, esprimojn, kiujn ili uzas en iliaj interŝanĝoj, en ilia korespondado, en iliaj gazetoj, — tio estas la plej grava parto. — 2) modelojn de leteroj, en kiuj estas esprimataj ĉiuj interkonsentoj kiujn povas naski la kolekto de poŝtaj markoj: interŝanĝoj, vendoj, aĉetoj, proponoj, k. t. p. — 3) modelojn de katalogoj, anoncoj, kostotabeloj. — Tiuj du lastaj partoj estas kontraŭ la unua tiel same kiel estas la praktiko kontraŭ la teorio.

Tuj kiam *tiu ĉi verko estos ekzamenita de D-ro Zamenhof*, mi intencas eldoni ĝin. Mi zorgos, ke ĝi estu eldonata en sama formato kiel nia franca lernolibro kaj per tute analogia speco de preso. Tiel ĝi estos simpla speciala aldono al la ordinara lernolibro: bezone, oni povos facile ĝin bindi kun tiu ĉi. Mi estus tre kontenta, se tio povus esti ekzemplo por la estontaj verkantoj kaj eldonantoj de analogiaj terminaroj. Tiel, en ĉia lingvo, la granda lernolibro kaj la diversaj aldonoj, kiuj iom post iom plenigos ĝin, formos belan unuforman kolekton, grandan enciklopedion, en multaj partoj, inter kiuj ĉiu elektos tion, kio respondas al liaj specialaj bezonoj.


Restas la financa demando, — ĉiam grava ĉe la esperantistoj, pro tiu bona kaŭzo, ke ni ne estas riĉaj. Antaŭ ol eldoni mian libreton, mi anoncos ĝin en gazetoj filatelaj kaj petos, ke ĉiu kiu intencas aĉeti ĝin volu sciigi tion al mi. Tial mi konos almenaŭ proksimume la sumon, je kiu mi povas kalkuli kaj samtempe la nombron da ekzempleroj, kiun mi devos mendi. *Saman ulvokon mi adresas hodiaŭ al la legantoj de la "Lingvo"*, — unue kaj speciale al la filatelistoj, poste ankaŭ al ĉiuj, kiuj konsentos helpi min por tiu ĉi eldono. Ili volu skribi al mi kiom da ekzempleroj ili aĉetos: kompreneble la pagon oni sendos sole post la eldono de la libro (ĝi kostos ĉirkaŭe 50 centimojn). Tiun pagon kaj ankaŭ la sumojn, kiujn malavaraĵ amikoj volus donaci al mi

por tiu celo, oni povas sendi per poŝtaj markoj de ĉia lando: ĉia ofero, eĉ la plej malgranda, estos danke ricevata.

Povu mia alvoko esti aŭdata de ĉiuj. — de vi precipe, amikoj filatelistoj.

**René Lemaire.**

Nunatempe, pro mia militista servado, mi devas loĝi en Châlons; — sekve oni volu adresi ĉiujn korespondojn laŭ la sekvanta adreso: *René Lemaire, 106-e régiment d'infanterie — 5-e compagnie. Châlons-sur-Marne. Marne. France.*



## El Heine.

### I.

Ĉirkaŭe la rozo flirtadas senĉese  
Kun amo la bel-papilio,  
Kaj la papilion per flamo anema  
Briligas la suna radio.  
Sed kiam, eldiru, la rozo ekamis?  
Eldiru al mi vi la veron,  
Ĉu la najtingalon, la dolĉan kantiston,  
Ĉu eble la stelon vesperan?  
Mi tion ne scias, sed mi, mi adoras  
Vin ĉiujn, vin, suna radio,  
Vin, stelo vespera, vin, bel-najtingalo,  
Vin, rozo, kaj vin, papilio.

### II.

Ne, amata, vi ne timu,  
Restu tie ĉi trankvila.  
Por ne esti forŝtelitaj  
Ni ŝlosiĝos per riglilo.  
Kiel ajn la vento blovas,  
Ĝi la ĉambron ne atingos,  
Ke ĝi l' domon ne bruligu,  
Ni la lampon nun estingos.  
Vi permesu vian kolon  
Ĉirkaŭvolvi per la mano,  
Por ke vi ne malvarmumu  
Sen la varma ŝalo lana.

### III.

Kiam mi mian doloron sopiris,  
Vi nur oscedis, nenion eldiris.  
Nun, ĉar ĝi estas vestita per rimo,  
Vi min laŭdegas kun granda estimo.

**A. Kofman.**



## Novajoj.

### Novaj eldonoj.

— Baldaŭ estos pretaj la angla, portugala, hispana kaj holanda eldonoj de l' nova propaganda broŝuro. Estas pretigata ankaŭ la itala eldono.

— De s-ro *I. Ŝirjaev* el Jaroslavo ni ricevis la sekvantaŭ leteron:

“La literaturo de nia lingvo nun estas jam sufiĉe vasta, sed bedaŭrinde en ĝi estas nenia religia verko \*), — ni ne havas en nia lingvo eĉ la Sanktan Evangelion! Konsciante la utilon, kiun alportus al nia lingvo la traduko de tiu ĉi sankta libro, mi decidis traduki ĝin. Por mi sola tiu ĉi grava afero estas tute neebila, sed mi esperas, ke niaj amikoj helpos al mi. Kiu aprobas

\*) Kredeble s-ro Ŝirjaev ne scias, ke en nia lingvo ekzistas jam la traduko de la libro Ruth (verko N:o 60) kaj la preĝareto por katolikoj de s-ro de Beaufront.

*Red.*

mian entreprenon, povas sin turni al mi. Kiam la traduko estos preta, ni petos ian esperantistan klubon aŭ societeton eldoni ĝin, kaj post la disvendado de la libro niaj amikoj, helpintaj al mi, povos ricevi la rekompencan por sia laboro. Mi esperas, ke la amikoj de nia lingvo ne rifuzos veni al mi kun helpo en tiu ĉi sankta afero.

“Mia adreso estas: *Rusujo, Mologa* (gub. de Jaroslavlo), selo *Vereteja* al Ivan Ŝirjaev.”

Rilate la entreprenon de s-ro Ŝirjaev, al kiu ni deziras plenan sukceson, ni povas diri, ke s-ro K. O. Svanbom prilaboras nun la tradukon de l' Evangelio de Mateo kaj ke tiu ĉi verko estos eldonita de la Uppsala Klubo.

— Eliris el presejo la dua eldono de la N<sup>o</sup> 54 de nia literaturo: “Regularo de la societo Espero.” La verko kostas 7 kop. = 20 cent. kun transsendo kaj estas ricevebla el la societo “Espero”, de s-ro Zamenhof kaj de s-ro Gernet en Odeso.

### Vojaĝoj de esperantistoj.

— S-ro V. Langlet jam komencis sian vojaĝon tra Rusujo. El Uppsala li forveturis en Peterburgen, ĉirkaŭ la 25-a de majo li estos en Moskvo kaj poste venos en Niĝni-Novgorod. El la ekspozicio li veturos en Borisoglebsk kaj vizitos tie s-ron Kazi-Girej kaj poste venos en Varsovion, kie lin renkontos s-ro J. Wasniewski, bona kaj malnova amiko de Esperanto.

### Progresado de nia lingvo.

— Kiel scias jam niaj legantoj, nia lingvo havis en la lastaj monatoj grandajn sukcesojn en Francujo, Portugalujo kaj Svedujo. Juĝante laŭ kelkaj leteroj, ricevitaĵ de ni en la lasta tempo, ni povas diri, ke la lingvo tre bone progresas ankaŭ en Rusujo. La nombro de la membroj de la societo Espero en Peterburg konstante pligrandiĝas kaj oni komunikas al ni, ke en Odeso kredeble baldaŭ estos oficiale permesita fondi la filion de tiu ĉi societo. En *Melitopol* (gub. Tavriĉeskaja) fondiĝas rondeto de esperantistoj: tie laboras s-ro T. Ŝĉavinski.

\* \* \*

— De s-ro *M. S. Rakitski* (Rusujo, *Suraj*, gub. de Vitebsk, selo *Ostror-skiĵe*) ni ricevis la sekvantan leteron:

“Kalendaro estas libro necesa por ĉiu, kaj ĉiuj ni ĉiujare ĝin aĉetas. Ĉu ne pli bone estus por ni kaj por nia afero, se ni havus nian apartan esperantan kalendaron kaj elspezus por ĝi tiun monon, kiun ni elspezas por aĉeto de kalendaroj, havantaj nenion komunan kun nia afero? Mi pensas, ke tio ĉi estus por ni tre oportuna kaj por nia afero tre utila. La esperanta kalendaro povus esti eldonata en formo de negranda broŝuro, laŭ la modelo de ordinaraj malgrandaj kaj malkaraj kalendaroj kaj ankaŭ kun la surmura kalendara tabelo. Tia kalendaro, presita, kompreneble, en la lingvo internacia, devas enhavi ordinaran priskribon de tagej kaj festoj de ĉiuj ĉefaj eŭropaj religioj (laŭ la nova kaj malnova stilo), fervojajn, vaporŝipajn kaj poŝtajn regulojn kaj taksojn de ĉiuj ĉefaj landoj, kaj ceterajn sciigojn, kiuj estas por ĉiu necesaj. En kalendaro ankaŭ devas esti lokitaj: mallonga priskribo de la komuna stato de nia afero (nombro da esperantistaj kluboj, nombro da abonantoj de la gazeto kaj “Biblioteko” k. e.) kaj mallongaj sciigoj pri la progreso de la lingvo en pasinta jaro. Verkante la kalendaron, oni devas, kompreneble,

loki en ĝin nur la plej necesan, la plej gravan kaj interesan, por ne pligrandigi vane ĝian koston. La esperanta kalendaro kun kalendaro tabelo povus esti ĉiujara aldono al nia gazeto kaj esti dissendata al ĉiuj abonantoj kun la decembra numero de la gazeto antaŭ tiu jaro, por kiu la kalendaro estas eldonita. Se la eldono de l' kalendaro laŭ mia plano estas nun ial neebla, tiam estus dezirinde, ke oni eldonu almenaŭ la kalendaran tabelon, kiu postulus tute bagatelajn sensignifajn elspezojn kaj kostus por ĉiu abonanto, mi pensas, ne pli ol 25 centimojn.“

M. S. Rakitski.

Ni plene aprobas la ideon de s-ro Rakitski, sed bedaŭrinde ni havas nek la liberan tempon, nek la sperton por verki bone la kalendaron. Krom tio la eldono de la kalendaro postulus sufiĉe grandajn elspezojn, kiujn ni ne povas nun fari. Se la nombro de niaj abonantoj pligrandiĝos en la sekvanta jaro, ni penos tiam plenumi tiun ĉi proponon, esperante, ke inter niaj abonantoj troviĝos personoj, kiuj helpos al ni kunmeti bonan kaj konvenan kalendaron. La surmuran tabelon ni eble eldonos eĉ en tiu ĉi jaro.

\* \* \*

La redakcio de la populara fizika-matematika ĵurnalo: “Vestnik Opitnoj Fiziki i Elementarnoj Matematiki“, eldonata en Odeso, petas nin anonci, ke ĝi akceptas artikolojn, problemojn, leterojn k. c. en la lingvo Esperanto, por presi ilin en rusa traduko. La esperantistoj, kiuj sin interesas je fiziko kaj matematiko kaj deziras havi pli detalajn sciigojn pri la programo de la ĵurnalo, volu sin turni laŭ la adreso:

Rusujo, Odeso. Redakcio de “Vestnik Opitnoj Fiziki“.

\* \* \*

En la N:o 5 de “L'Étranger“ sin trovas granda kaj tre interesa artikolo de s-ro V. Langlet: “Vizito ĉe Lev Tolstoj“, malgranda letero de s-ro V. Smurlo (ankaŭ en nia lingvo), la folieto: “Esperanto-Petites nouvelles“ de s-ro L. de Beaufront kun sciigo pri la specialaj vortaroj kaj pri la “Biblioteko“ kaj la anonco de s-ro Zinorjev pri lia vojaĝo (ankaŭ en Esperanto).

\* \* \*

Eliris el la presejo la nova lernolibro sveda, pri kiu ni parolis en la antaŭa nro de nia gazeto. La libro kiu estas verkita de s-ro A. P. Nylén membro de la klubo en Uppsala, sin prezentas tre bone en sufiĉe bela eksterajo kaj instruanta enhavo. Ĝi enhavas gramatikon (preskaŭ la saman kiel en la libro nro 66) kaj ekzercaĵojn kun klarigoj en sveda lingvo — kune 40 paĝojn — kaj kostas kr. 0.10. Oni povas ĝin recevi ĉe la Klubo esperantista en Uppsala aŭ ĉe doktoro Zamenhof en Grodno. Ni ĝin rekomendas al niaj legantoj.

\* \* \*

Estas presita la sveda broŝuro por propagando. Ĝi prezentas sur 32 paĝojn la saman enhavon kiel la franca broŝuro (nro 86) kaj ankaŭ du atestejojn de sveda profesoro J. A. Lundell kaj majoro C. Adelsköld, membro de l' sveda reĝa Akademio en Stockholm, pri la utilo de nia lingvo Esperanto. Ĝi estas tradukita de s-ro V. Langlet en Uppsala.

\* \* \*

S-ro S. A. Denissievski, instruisto de la gimnazio en Romni, gub. Poltava, Rusujo, nin sciigas, ke li vizitos la ekspozicion de N.-Novgorod en Junio 10—20 kaj tre volus konatiĝi kun aliaj esperantistoj.

\* \* \*


S-ro F. Brich en Josefstadt (Aŭstrujo) skribis la 25<sup>a</sup> al la Klubo Esp. en U. interalie: “Mi estas tre ĝojigata povi Vin sciigi, ke mi atingis kun la propagandaj broŝuretoj ian sukceson. “*Naše doba*”, en Prago eliranta bohema monata gazeto (*revue*) por scienco, arto kaj sociala vivo, alportis en la numero de majo artikolon, de kiu jen la traduko”. — Ĝi parolas pri nia afero, nia lingvo kaj citas la opinion, kiun esprimis Lev Tolstoj pri Esperanto; nomas nian gazeton kaj la boheman lenolibron k. t. p. — “Eble ankaŭ Vin interese kion skribis “*Die Zeit, Wien 16. Mai 1896*” en la rubriko *Revue der Revuen*: ‘En la “*Fortnightly Review*” tuŝas Mrs. Olive Schreiner en ŝia artikolo pri Suda-Afriko interalie ree unufoje la ideon de la mondlingvo, de idiomo, per kiu ĉiuj tagaferoj, ĉiuj akiroj de la scienco kaj ĉiuj produktoj de la literaturo povus esti akirebligataj al ĉiuj nacioj de la tero. Eĉ en la antikvaj tempoj, kiam la rapidaj komunikiloj mankis, eĉ la libropresado ne estis ankoraŭ elpensita, la latina lingvo, komuna al ĉiuj civilizataj nacioj, estus kreinta grandegan kunemecon, kaj estus helpinta senfine al rapida vastigado de la sciencoj. Hodiaŭ estas metata per la telegrafo tia ringo ĉirkaŭ la tuta tero, ke la raporto de gravaj aferoj traflugas eĉ en unu sama tago ĉiujn lokojn de la globo. Tiom pli grave estus, tian malvastan kunigitecon de ĉiuj popoloj ankoraŭ plimalvastigi per komuna lingvo. Do la verkistino sin limigas nur je tia maldetala tuŝado, sen ia praktika propono al efektivado de tiu ĉi pripenso.’

Volu do sciigi la verkistinon kaj *Fortnightly Review* pri nia lingvo!” — —

\* \* \*

**Pri la lingvo Esperanto parolis** en la lasta tempo la sekvantaj gazetoj kaj ĵurnaloj: en la N:o 81, 82 kaj 83 de la ĉiutaga gazeto “*A Provincia*”, eldonata en Porto (Portugalujo) estas presita tre bona, longa kaj konvinke skribita artikolo pri nia lingvo, portanta la titolon: *A lingua internacional “Esperanto”* kaj apartenanta al la plumo de s-ro *Ribeiro da Costa e Almeida*. La unua parto (en N:o 81) de tiu ĉi artikolo estas dediĉita al la historio de provoj krei lingvon internacian ĝis la apero de Esperanto. La duan parton (en la N:o 82) la aŭtoro komencas per la pruvo, ke lingvo internacia povas ekzistadi, ne disiĝante en la serion da diversaj dialektoj. Poste la aŭtoro komparas Volapükon kun Esperanto kaj donas kelkajn sciigojn el la historio de Esperanto. La tria parto (en la N:o 83) estas dediĉita al la gramatiko de nia lingvo kaj provizita per diversaj ekzemploj. La aŭtoro finas la artikolon per mallonga sciigo pri nia gazeto. — S-ro *D. Marignoni* sendis al ni la N:o 361 de la gazeto: “*Pieramosca*”, eldonata en Firenze. En tiu numero estas presita artikolo pri nia lingvo sub la titolo: “*Una nuova lingua universale*.” La artikolo ne estas subskribita. “Esperanto” — jen estas. — tiel komencas sian artikolon la nekonata aŭtoro. — Kiu ĝin konas? Tre malmultaj personoj, mi supozas, kvankam oni legas en rusaj kaj francaj gazetoj, ke ankaŭ Italujo enhavas adeptojn de l’ nova lingvo. Ĉar, por diri veron, se mi demandus grupon da amikoj: “Ĉu vi scias ion pri Esperanto?” mi yetas, ke ilia penso sin turnus al ia artisto (pri kies sekso mi silentas) aŭ al ia kreskaĵo malordinara kaj nekonata k. t. p. Tamen ekzistas lingvo tutmonda, pri kiu mi parolas; tamen en Rusujo, en Germanujo, en Anglujo, en Svedujo, en Ameriko, eĉ en Afriko oni renkontas adeptojn de tiu ĉi “Esperanto”, kiuj korespondas reciproke kiom ili povas”. Poste la nekonata aŭtoro rakontas pri la nuna stato de nia lingvo, pri la novaj eldonoj en Esperanto, pri la agado de niaj francaj amikoj, donas ekzemplojn de vortformado kaj konsilas ellerni la “novan” lingvon, mirante ĝian simplecon. “La instruantoj de la nova lingvo, — li diras, — ne fariĝos baldaŭ tro riĉaj homoj...” — En la N:o 3591 de la ĉiutaga gazeto “*Odesskija Novosti*”, eldonata en Odeso, estas presita artikoleto pri la sukcesoj de nia lingvo, sub

la titolo: "*Sukcesoj de la esperantistoj*". La aŭtoro konfesas, ke en la fundamento de nia lingvo estas metita la nobla celado al la unuiĝo de l' homoj al la faciligo de internaciaj rilatoj, t. e. la samaj celadoj, kiuj animigas nun la apostolojn de la "Ligo de l' paco", de la ideo de l' komuna senarmiĝo k. t. p. La artikoleto enhavas sciigon pri nia gazeto, pri "Biblioteko", pri "Kain", kaj "Fantomoj", pri la internaciaj vojaĝoj kaj pri la sukcesoj de la lingvo inter la ciklistoj. — En la N<sup>o</sup> 4 de la ĵurnalo "*Icaea*", organo de la internacia societo de korespondado, sin trovas serioze skribita artikolo: "*Der praktische Werth der künstlichen Weltsprachen*", subskribita *Carl Kainz*. La aŭtoro pensas, ke la mondlingvo estas nur "ludilo por grandaĝaj infanoj". Pri tiu ĉi artikolo ni raportos pli detale en nia sekvanta numero. — En la N<sup>o</sup> 107 de la ĉiutaga gazeto "*Östgöta Correspondenten*", eldonata en Linköping (Svedujo), sin trovas malgranda artikolo pri la nova lernolibro por svedoj kun kelkaj vortoj da laŭdo pro la beleco de la tre simpla lingvo, kiu, laŭ la opinio de la skribinto, havas la estontecon precipe kiel turista lingvo. —



## Leteroj, al la redakcio.

### *Tre estimata Redaktoro!*

Volu doni lokon sur la folioj de Via gazeto internacia, legata ne sole en la patrolando de l' aŭtoro, sed ankaŭ en ĉiuj aliaj landoj, al mia respondo al s-ro Ciolkovski je la demando, kiu, mi permesas min pensi, havas intereson tutmondan.

Observante en la lastaj jaroj la sukcesojn de la veturado aeroplana, t. e. sekvanta la tezon, "pli peza ol aero" kaj traleginte ĵus la trian libreton de s-ro K. Ciolkovski sub la titolo: "Aeroplano aŭ birdoforma maŝino fluganta", mi rimarkis, ke la estimata aŭtoro, ripetante opinion de aliaj spertistoj (Lilienfeld, Maksim k. c.), diras, ke la ilo devas ekflugi (enaeri) nur post la ricevo de rapidega antaŭenmovo, kaj tial povas komenci sian aeriradon nur sur speciala platformo aŭ relvejo; tiel ankaŭ ĝi povas fini felice sian vojon nur ĉe tiuj samaj kondiĉoj. La penso, ke ĝi povas uzi akvan nivelon de maroj kaj lagoj kaj, en specialaj okazoj, la supraĵon de la neĝa kovrilo ŝajne faras la uzon de tiuj ĉi iloj tre limigita.

Laŭ mia opinio, nur uzante motorojn (movilojn) pli potenciajn, kiuj povas teni en aero la tutan pezon de ilo kun ĝia ŝarĝo, ni povas atingi la celon.

Cu la dirita estas vera, mi volus aŭdi opiniojn de specialistoj.

Ĉelabinsk 18, III, 1896.

Inĝeniero V. Ŝmurlo.



### *Estimata redaktoro!*

Eksciinte de Vi ke la presado de 8 paĝoj de Via gazeto kostas 14 rublojn, mi sendas al Vi tiun ĉi sumon da mono kaj petas Vin pligrandigi la majan numeron de la "Lingvo Internacia" je 8 paĝoj. Mi ne dubas, ke inter niaj amikoj troviĝos ankaŭ aliaj personoj, kiuj uzos tiun ĉi rimedon pligrandigi nian gazeton sen specialaj elspezoj de la eldonanto, kaj ke ĉiu sekvanta numero de la "Lingvo Internacia" elirados en ion pli granda amplekso.

Odeso, Hersonskaja, 25. 1896, IV, 25.

Kun Saluto

S. Ŝatunovski.



## Vivo internacia.

### **Societoj de internacia korespondado.**

Sendube niaj legantoj scias, ke en daŭro de kelkaj jaroj jam ekzistas kaj havas grandan sukceson la societo ICAEA, kiu havas la celon faciligi la internacian korespondadon. Multaj esperantistoj estas membroj de tiu ĉi societo.

Nun kun granda ĝojo ni povas komuniki al tiuj el niaj legantoj, kiuj ne abonis la ĵurnalon "*L' Etranger*", ke la "Societo de Internacia Ellernado", kies organo estas "*L' Etranger*", fondis ankaŭ oficejon por internacia korespondado (Bureau de correspondance internationale). Ĉar la societo varmege



proponas nian lingvon, la mirindan ilon por korespondado, ni ne dubas, ke multaj esperantistoj aliĝos al tiu ĉi societo. Tial ni trovas utila komuniki mallonge pri la senco de tiu ĉi "oficejo por internacia korespondado", aŭ simple "I. C." (Internationale Correspondance); la detalajn sciigojn ĉiu povas ricevi rekte de s-ro E. Lombard (Paris, 77 rue Deufert-Rochereau).

"I. C." havas la celon pliproksimigi siajn membrojn, plifaciligi ilian korespondadon, montrante precize, je kio okupas sin ĉiu el ĝiaj membroj, kio lin interesas, kion li scias kaj kion deziras scii, en kiuj lingvoj li povas legi kaj en kiuj skribi. Tiamaniere ĉiu el la membroj povas elekti personojn, kiuj estos al li utilaj, kaj li mem estos utila por aliaj personoj.

La "I. C." estas dividata en sep grandajn apartaĵojn:

*Ap. I-a* ekzistas por la personoj, kiuj amas la mondon, la societon, la plezurojn kaj deziras korespondadi pri tiuj ĉi objektoj. Ĝi ekzistas ankaŭ por la personoj, kiuj deziras vojaĝi en fremdaj landoj kaj bezonas havi sciigojn pri diversaj urboj, remarkindaĵoj kaj vidindaĵoj.

*Ap. II-a* — por la personoj, kiuj deziras korespondante ellerni praktike ian lingvon.

*Ap. III-a* — tre grava — estas kreita por literaturistoj kaj artistoj: ĝi donos la eblon al ĉiu literaturisto trovi la plej konvenan ĵurnalon por liaj verkoj, liveros al li kaj al artisto la informojn, kiujn ili bezonas.

*Ap. IV-a* — por la kolektistoj de libroj, pentraĵoj, poŝtsignoj, moneroj k. t. p.

*Ap. V-a* — speciale per junuloj de diversaj landoj.

*Ap. VI-a* — scienca, por ĉiuj, kiuj bezonas informojn kaj sciigojn el kia ajn regiono de la scienco.

*Ap. VII-a* — por komercistoj kaj produktistoj.

Ĉiujn adresojn de la membroj de I. C., demandojn kaj informojn la leganto trovos en "L' Etranger."

La jara pago por la membroj estas 8 frankoj\*). Ĉiu membro ricevas senpage "L' Etranger", havos la rajton korespondadi kun aliaj membroj kaj devas respondi la leterojn de la membroj, adresitajn al li.

Ni invitas la esperantistojn fariĝi membroj de "I. C."

\* \* \*

### **La dekdua kongreso internacia de kuracistoj.**

La Aganta Komitato de la medicina kongreso en Moskvo permesis ankaŭ la lingvon anglan por disputoj kaj raportoĵoj en la kongreso. Sendube la artikoloj de anglaj kaj amerikaj medicinaj ĵurnaloj, pri kiuj ni skribis en la antaŭa numero de nia gazeto, igis la komitaton fari tiun ĉi decidon. Sekve la celado forigi la diverslingvecon per lingvo nacia havis efektive nenian rezulton kaj la diverslingveco denove reĝos en tiu ĉi kongreso. Ni ne forlasu la okazon prezenti nian lingvon al la kuracistoj!

— S-ro *Costa e Almeida* (Rezende, Portugal) tute aliĝas al la propono de s-ro Kazi-Girej pri la invita broŝureto (vidu la N:o 4 de "L. Int."): li penas traduki la broŝureton en lingvon portugalan kaj dissendi ĝin al la portugaliaj kuracistoj.

\* \* \*

Ni petas niajn legantojn alsendadi al ni la sciigojn por la rubriko "Vivo Internacia".

\*) La novaj membroj devas pagi ankoraŭ 1 fr. por la enskribo.

## Ĉe Aĥmed' Paŝa', la granda pentristo.

Estis en Konstantinopolo, kaj la tago estis bela julia tago en la somero pasinta. Mia amiko Nehad Bej kaj mi, ni migris laŭlonge la strato, kiu iras de la ponto de la Galato ĝis Aĵa-Sofia. La suno bruligis, la hejtanta suno de tagmezo en la sudo — eĉ la plenforta altekreska bulgaro kun nudaj piedoj, brakoj kaj brusto, kun la flavkupra trumpeto en mano, kiu kuris antaŭ la omnibus', tiam kaj iam donante piedpuŝon al ia malrapida hundido, kiu ekdormis inter la koto sur la strato — eĉ ankaŭ li sopiregis pro la varmeco kaj streĉa laboro, dum li senĉese kun la libera mano penis fari elfluon por la riveroj da ŝvito, kiuj sennombraj kiel la fontoj de Nilo, sin elverŝis super lia kuprokolora vizaĝo.

Sed ni du, Nehad Bey kaj mi, ne longtempe deviĝis sopiri pro la varmeco kaj la polvo sur la stratoj de *Stambul*. Ne multe da tempo pasis, ĝis ni atingis nian celon — la aristokrata domo de Aĥmed Paŝa en unu el la mallaŭtaj, distingaj kvartaloj sur la supraĵo de unu el la sep montetoj de *Stambul*. — Tie ĉi supre estis silente, tiel malbrue kaj "nobele". Neniaj vokantaj "verdaĵistoj" (vendantoj de verdaĵo por manĝo) tie ĉi kriis sian eternan *Tomati y-a, toma-ti-y-a*, neniaj malgrandaj hebreknaboj tie ĉi kurante ĉirkaŭ niaj piedoj postulis monerojn, neniaj levantanoj (homoj el Levanto, la bordo de l' Egea maro) trumpetis en niajn orelojn siajn senmezure eminentajn ecojn kiel gvidantoj kaj — la plej bona el ĉio — neniaj skabiaj hundoj kuŝis fermante por ni la vojon sur la strato.

Ĉe la frapado de Nehad Bej respondis apud la pordo de Aĥmed ia platnaza, fulgenigra individuo, kiu, ŝajne, venis rekte el la Geheno, sed en vero kredeble nur estis el la plej suda Sudana provinco de l' Egipta khedivo.

Grimacante saluton de bonvenado, tiel ke la buŝanguloj malaperis en necerta malproksimo apud la regionoj de l' oreloj, li faris ĝentilegan orientan kliniĝon antaŭ mia altekreska turka amiko kaj, post mallonga rigardado de mia malsignifa persono kaj mia blanka sveda ĉapelo de studento, li rapideme forkuris por anonci al sia sinjoro, la potenca Aĥmed Paŝa, la fidelulo de l' sultano kaj eminenta ano de l' Grand-Sinjora kortego.

Dume alia servantulo min kondukis en la domon tra kelkaj koridoroj kaj super unu larĝa tapiŝa ŝtuparo, gis ni fine alvenis en la ĉambron de vizito.

Por mi, kiu pensis trovi ĉambron de turka modelo, kun longaj, malaltaj kaj molaj kanapoj laŭlonge la muroj, kun floraj ŝtofoj kaj multkoloraj teksaĵoj ĉie pendigitaj — kie konvenas kaj kie ne konvenas —, kun argilaj potoj kaj stanaĵoj vazoj de stranga formo en vicoj sur la bretoj de muro, kaj plu en la sama stilo — por mi la vizita ĉambro de Aĥmed ŝajnis tute surprizanta. Kelkaj invitantaj malgrandaj kanapoj, tie kaj ie tabureto, granda tablo plena da modernaj ilustritaj verkoj, kelkaj *staflioj* kun pretaj aŭ ankoraŭ ne pretigitaj pentraĵoj, kaj la muroj kovritaj — ne per multkoloraj ŝtofoj el Persujo kas Kaŝmir', sed per tute eŭropaj desegnaĵoj, gravuroj kaj fotografajaĵoj kune kun ia pentraĵo. Inter la multaj portretoj de anoj de eŭropaj princedoj aparte unu okupis mian atenton; estis de Oskar 1:a, nia reĝo, en uniformo de admiralo kaj ornamita kun la nomo, skribita, ŝajne, per la mano de l' reĝo mem.

Mia amiko Nehad — sed mi do forgesis prezenti lin al miaj legantoj!

Li estas leŭtenanto ĉe la dragona regimento ĉevala de Lia moŝto Grand-Sinjora kaj cetere neordinare impozanta kaj bela viro. Lia kresko alta kaj gracia portas bele formitan kapon kun trajtoj, kiam li silentas, ŝajne fanditaj el bronzo, sed kiam li parolas — en franca kaj en tute bonega eminenta franca lingvo — ili viviĝas per la ŝanĝantaj dispozicioj de sentoj, kiuj, kontraŭ la turka kutimo, ŝajne regas mian amikon. Cetere estas la fundamento inter ili ia nesuperiĝebla kaj preskaŭ ne tro alte taksebla amindeco kaj amikeco, kiun malŝpare elverŝas ĝia posedanto sur la nemeritanta fremdulo el malproksima Nordo.

Sed dum mi staras okupite rigardante la akceptan salonon de Aĥmed Paŝa kaj la militistan kreskon kaj vire belan vizaĝon de mia akompananto, tiam subite malfermiĝas la pordo kaj eniras la mastro mem, Aĥmed Paŝa, la granda kortegulo kaj artisto. Malalta kaj ronda li estas kaj ŝajnas pli humora ol precipe impozanta kun tiu malgranda "stomakego", la nigraj, ludantaj okuletoj, kiuj tre similas al sekvinberetoj en tritikbulko, kaj la buŝo, sur kiu ludas humoristika rideto.

Al Nehad Bej, kiu en sia elkora ĝentileco kaj en la sento de l' alta rango de sia estro, ne tute bone scias, kiel profunde li kliniĝos aŭ ĉu sur la piedoj li riskos stari, — al li Aĥmed salutas ĝuste *à la turque* t. e. kun la du manoj levigitaj ĝis la tempioj kaj la manplatoj etenditaj unu kontraŭ la alia. Mi do kontraŭe ricevas post la prezentado koran tute "okcidentmondan" manpremado kaj post mallonge mi kun la mastro estas en viva interparolado pri mia patrolando, kiun li tute ne konas, kaj ĝia reĝo, kiun li kontraŭe vidis kaj trovis "ĉarmanta".

Sed baldaŭ Aĥmed Paŝa transiras al aliaj aferoj, ĉar li nur duone estas diplomato kaj monda homo, kaj plej proksime al lia koro sendube kuŝas lia *arto*. Kaj simile al ĉiuj "diletantoj" li tre volonte montras siajn laboraĵojn kaj aŭskultas la opiniojn pri ili. Ankaŭ mi nun devis diri mian opinion pri liaj pentraĵoj, kvankam li ne povis scii, ĉu mi komprenis liajn pejzaĝojn kaj "stilleben'ojn" pli bone ol ia bovino. Unu post l' alia estis eltirita el la granda amaso da pentraĵoj, kiuj kovris la *stafliojn* kaj starigilojn kaj staris en amasoj apud la muroj; jen pejzaĝoj el Malgranda Azio, kun freŝa kaj superfluanta kreskaĵaro, jen el la senarbaj montetoj apud Bosporo, jen estis plenviva strata sceno el Stambul, jen ree ia frukto-, besto- aŭ floropentraĵo.

Li estis tre multflanka en sia pentrado, la bona paŝa', sed parolis tre humile pri sia talento, kio tamen ne malhelpis, ke liaj okuletoj lumiĝis per kontenteco, kiam mi elparolis mian raven je liaj vere tre prosperitaj floropentraĵoj. Li ne laciĝis, priskribante, kie, kaj ĉe kiuj kondiĉoj ĉiu aparta pentraĵo estis farita, kaj rakontis laste ke la laboraĵo, kiu nun lin okupis, estos donaco al lia Ottomana majesto.

Kaj nun la kafo estis enportita, la kafo, kiun oni senkondiĉe trinkas en ĉia vizito ĉe unu *osmanli*. Estis la ordinara turka malbonaĵo, kuirita tute dika kaj kun sukero, ke ĝi similis al ia bruna melaso. Sed krudigita per tio, kion mi antaŭe suferis en tiu speco, mi sengrimace malplenigis mian malgrandan taseton, en grandeco simila al ia ovingeto. Nehad Bej videble kontenteguste gustigis la dikan dolĉegan trinkaĵon kaj englutis grandegajn kvantojn de la sengusta, fadena kaj pastema turka konfitaĵo, kiu samtempe estis ĉirkaŭportita.

L' aŭdienco estis finita kaj ni leviĝis por adiaŭdiri. Sed tiam sekrete Aĥmed rakontis, ke li posedis ion, kion li devis montri al ni antaŭ ol ni iros. Kaj nun ni sekvis lin malsupren la ŝtuparon kaj poste per kelkaj

tute turke aranĝitaj ĉambroj kun tapiŝoj kaj “divanoj” (kanapoj) kaj lignaj kradoj antaŭ la fenestroj, ĝis li fine haltis apud la eniro en sutiĉe malgranda, longeta ĉambro, malalta kaj ne tro bone lumigita. En la fono aperis tuta floraro kun grupoj kaj florbedoj kaj tie-alie iaj belegaj granat- kaj oranĝarboj kun iliaj brilaj fruktoj.


“Mais dites donc, mon général, qu'est ce que vous avez là?” . . . . Kaj mi ekkomencis esprimi mian miron vidi tutan ĝardenon enmigrintan en tiu ĉambro, kiu devus esti tre malbona oranĝerio. — Mi malofte aŭdis pli koran ridon ol tiu, kiu sekvis miajn vortojn. Ahmed Paŝa ridis tiel ke lia stomaketo saltadis kaj la sekaj vinberetoj tute malaperis en la tritika bulko, kaj Nehad Bej, kiu estis enigita en la sekreto, ridis kvazaŭ laŭ ofico kaj batis liajn genuojn en gajo, dum la malgranda paŝa' deviĝis sidiĝi, por ke li ne perdu la egalpezon.

La gajeco de l' du turkoj sendube estis infektanta, sed ne scianta, je kio ili en vero ridis, mi komence iom ĝenis kaj min tenis serioze, ĝis la malgranda paŝa', kun la larmoj, ruliĝantaj super liaj grasaj vangoj, fine elkriis: “Sed ĉu vi do ne vidas, ke ĝi nur estas pentraĵo? Estas ke mi min amuzis dekoraciante la muron tie kun floroj kaj arbetoj kaj arboj — kaj ĉiuj enirantaj tien-ci pensas ke estas malgranda ĉambroĝardeno. Ho ho ho, hi hi hi,” . . . kaj li denove enfalis en vida paroksismo, en kiu mi nun volonte partoprenis.

Kaj tiam li rakontis al mi — tute ne por fanfaronado sed “nur kvankam” — ke unu fojo li prosperis pentri sur blanka muro en la ĝardeno de l' sultano unu floran bedon tiel naturan — *parole d'honneur, monsieur*, nenia fanfaronado, nur la vero — ke Lia Moŝto Grand-Sinjora favore lasis sin trompigi kaj aliris por preni unu floron! Kaj la ĝardenisto poste venis kun sia akvujo kaj superverŝis la pentritan de Ahmed florbedon egale malŝpare kiel la florojn kiujn li mem antaŭe plantadis — faro, kiu kuntiris super la kapon de l' ĝardenisto la Grandsinjoran malfavoron, kiu tamen estis reprenita, kiam Ahmed Paŝa remetis la florojn en ilia unua brila ordo.

“Sed Vi do estas alia Apelles, mia generalo, kaj kompare vin, estis Zeuxis kaj Panhasios nenio alia ol simplaj nudaj maltaŭguloj!” — Mia komplimento estis akceptita kuu favora rideto, — ankoraŭ unu manpremo kaj post kelkaj minutoj estis mia vizito ĉe Ahmed' Paŝa', la granda kortegulo kaj artisto — nur unu rememoro.

**Valdemar Langlet.**



## El M. Lermontov.

Velete blankas en etera  
Vasteco de la blua mar'.  
Pro kio kuras ĝi de l' tero  
Kaj kion serĉas sur l' ondar'?

La vento fajfas sur la vojo,  
La masto krakas kun stertor',  
Ho ve! ĝi kuras ne al ĝojo  
Kaj ne de ĝojo kuras for.

Sub ĝi kaj supre — luma brilo,  
Sed ĝi celadas nur al vent',  
Kiele se en maltrankvilo  
Troviĝus paco kaj kontent'.

**A. Kofman.**



## Nova hipotezo pri deveno de Aŭstralio.


Aŭstralia kontinento tiel distingigatas inter ĉiuj ceteraj kontinentoj de l' tera globo kaj prezentas tiajn rimarkindajn anomaliojn, ke ĝia deveno ŝajnis ĉiam enigma. Antaŭ ĉio turnas atenton en Aŭstralio plena foresto de efikantaj aŭ estingiĝintaj vulkanoj kaj eĉ de ĉiuj postesignoj aŭ aludoj pri vulkana efikado, malgraŭ tio, ke Aŭstralio troviĝas en la centro mem de seninterrompa vulkana duonringo, kiu ĉirkaŭas ĝin en tre proksima spaco kaj kiu finiĝas en Nova Zelandio. Tiu ĉi fakto estas tiom pli neklarigebla, ke subtero de Aŭstralio konsistas nome el tiaj ŝtonaj specoj, en kiuj ĉiam oni observas post-signojn de vulkanaj influoj. Sur la tuta tera globo nenie estas tia granda placo, konsistanta el primitivaj specoj aŭ formacioj, en kiuj oni observas ion similan al tio, kion oni observas en Aŭstralio, t. e. plena foresto de ĉiaj post-signoj de vulkanaj aperoj, kiel en nuna, tiel ankaŭ en estinta tempo. Krom tiuj ĉi anomalioj en Aŭstralio ekzistas ankoraŭ multaj strangaj apartecoj, distingantaj ĝin de ceteraj kontinentoj de l' tera globo. Tiajn samajn apartecojn prezentas ankaŭ aŭstraliaj montoj. Kontraŭe al aliaj kontinentoj en Aŭstralio ekzistas nur escepte apartaj altaĵoj, tute izolitaj kaj ne kunligitaj inter si. Solan escepton prezentas la monta ĉeno, kiu sin tiras laŭlonge de orienta kaj parte de sud-orienta bordo. Sed formiĝo de tiu ĉi ĉeno povas esti klarigita per tio, ke interspacoj inter apartaj altaĵoj estis ekplenigitaj per produktoj de rapida disfalo de ŝtonaj masoj, dank' al la proksimeco de l' oceano, akcelanta pli rapidan detruadon de l' ŝtonaj specoj. Tia anomalio prezentas en Aŭstralio ankaŭ la foresto de grandaj riveraj sistemoj; tie estas nur malgrandaj riveretoj, ofte sekiĝantaj kaj fluantaj laŭ iaj fosajĵoj. Dum sur ĉiuj aliaj kontinentoj ekzistas vastaj valoj kaj ebenaĵoj kaj grandaj riveraj sistemoj, liverantaj al la tera supraĵo pli aŭ malpli senĉesan irigacion. En Aŭstralio videble tute ne ekzistas subteraj fontoj en internaj partoj de kontinento, kaj irigacio de tero estas tre neregula. Nur en certa tempo de jaro, post la periodo de pluvoj disvolviĝas kreskaĵaro, dank' al granda malsekaĵo; en alia tempo la internaj partoj de kontinento prezentas sekan, ŝtonan kaj senfruktan dezerton. Rimarkinda ankaŭ estas tio, ke la supraĵo de aŭstralia kontinento estas elsulkigita en ĉiuj direktoj per multenombraj fendoj, kies deveno estas nekomprenebla, ĉar oni ne povas alskribi ilin al la efiko de vulkanaj fortoj. Ĉiuj tiuj ĉi anomalioj, renkontiĝantaj sur la aŭstralia kontinento, tre enigmaj kaj nekompreneblaj, fariĝas facile klarigeblaj, se nur akcepti hipotezon pri meteora deveno de Aŭstralio. Tiu ĉi hipotezo en unua fojo estis eldirita de franca instruitulo Djufren kaj alplenigita de Frohmann en lia nova laboro "les merveilles de la flore primitive", antaŭ nelonge elirinta en la mondon. Kvankam tiu ĉi hipotezo pri "netera" deveno ŝajnas mirinda kaj kuraĝa, tamen oni devas konfesi, ke ĝi havas nenion nekredoblan aŭ neeblan, aparte ĉe tiuj faktaj pruvoj, kiujn alkondukas la instruituloj por pravigi sian teorion. Antaŭ ĉio ili montras tion, ke laŭ la teorio de formiĝo de l' planeda sistemo la tera akso devus esti vertikala al la ebenaĵo de ekliptiko, dume ĝi staras ne rekte sed klinite al la ebenaĵo de l' turniĝo de l' tero ĉirkaŭ la suno, kontraŭ al ĉiuj teoriaj meditadoj kaj leĝoj de meĥaniko. La historio de tiu kreskaĵaro sur la tera globo, dank' al kiu formiĝis la kuŝantaj en la interno de l' tero ŝtonkarbaj tavoloj, donas kelkajn montrerojn, konstatantajn hipotezon

pri antaŭa vertikaleco de l' tera akso. Tiuj ĉi ŝtonkarbaj tavoloj estas dismetitaj laŭ la tero tre neegalmezure: en ekvatora kaj en tropikaj regionoj tiuj ĉi tavoloj renkontiĝas malofte kaj estas tre maldikaj, dum en mezaj kaj polaraj landoj ili troviĝas en superfluo kaj distingiĝas per dikeco kaj vastigiteco. Krom tio ne estas dubebla la fakto, ke la ŝtonkarbaj tavoloj en nordaj kaj polaraj termezuroj devenis multe pli frue, ol en plej proksimaj al la ekvatoro termezuroj, kaj tio ĉi klare montras, ke la kreskaĵa vivo sur la tero disvolviĝas komence ĉe la polusoj, kaj post tio jam de tie disvastiĝas al la ekvatoro. Riĉeco de ŝtonkarbaj tavoloj en nordo atestas pri neĉirkaŭprenablaj kvantoj da surtavoliĝintaj tie kreskaĵaj restoj kaj pruvas, ke polara floro en la ŝtonkarba periodo per sia riĉeco malproksime superis eĉ la nuntempan tropikan floron. Komprenoble, por tio, ke povu disvolviĝi tia kreskaĵaro, estis necesaj lumo kaj varmo, kaj tial oni devas vole-ne-vole supozi, ke en la polaraj landoj en tiu ĉi periodo ekzistis favoraj kondiĉoj por disvolviĝo kaj kresko de kreskaĵoj; tiuj ĉi samaj kondiĉoj estas neblaj ĉe ekzistanta nun kliniĝo de l' tera akso kaj oni devas supozi, ke tiam tiu ĉi kliniĝo ne ekzistis, la akso de l' tera turniĝo staris rekte, kaj sur la tuta tero de l' polusoj ĝis la ekvatoro estis nur unu seninterrompa kaj neŝanĝebla tempo de jaro, kaj la tagoj estis egalaj al la noktoj. Kial devenis tiu ĉi kliniĝo, elvokinta subitajn ŝanĝojn de klimato sur la tero? Suprenomitataj instruituloj proponas la sekvantan hipotezon por klarigi tiun ĉi aperon: la kliniĝo de l' tera akso devenis sub influo de ekstera forto, kiu subite elbatis la teran globon el ĝia komenca situacio. Tia "ekstera" forto povis esti grandega meteora maso, falinta sur la teron el la profundajoj de l' ĉiela spaco, kiu per sia falo neniigis la antaŭan egalpezon de nia planedo. Falado de kosmaj korpoj prezentas sufiĉe oftan kaj ordinaran aperon sur la tera globo. Laŭ la alproksimitaj elkalkuloj sur la teron falas en dudek kvar horoj kelkaj centoj da miloj da meteoroj. Plej ofte tiuj ĉi meteoroj estas malgrandaj laŭ sia amplekso, tamen iafoje renkontiĝas inter ili grandegaj. Nenio estas nekredibla en tiu supozo, ke en la sferon de l' tera altiro povis veni tre granda kosma korpo, kies falo estis la kaŭzo de ŝanĝoj sur la tera globo. Tiu ĉi grandega laŭ sia grandeco kaj pezo meteoro estas Aŭstralio.

Djufren supozas, ke sur tiu loko, kie troviĝas Aŭstralio, devis ekzisti antaŭe ia granda vulkana centro, kiu estis poste kovrita kaj neniigita per la falinta tien ĉi asteroido. Frohmann montras krom tio ankaŭ tion, ke la tera akso estas deklinita je  $23^{\circ} 28'$ , kaj la centro de l' Aŭstralio kontinento ĝuste ankaŭ troviĝas sub 23:a grado de l' suda termezuro. Konsisto el ŝtonaj specoj, kiuj formas fondon de Aŭstralio nenion diras kontraŭ la hipotezo pri ĝia meteora deveno. Se oni akceptas tiun ĉi hipotezon, ĉiuj anomalioj, kiujn prezentas la Aŭstralia kontinento, fariĝas klarigeblaj kaj perdas sian enigmecon. Komprenoble, nenia imago povas prezenti al si la pentraĵon de tiu terura tremado, kiun devis elprovi la tero en la momento de falo de tia asteroido. La katastrofo devis esti laŭvere terura, en plena senco de tiu ĉi vorto, ĉar terura ĉion ekstermanta uragano devis traflugi laŭ la tuta supraĵo de l' tero, kaj oceana ondo de gigantaj mezuroj devis leviĝi kaj superakvigi la teron de l' suda duonglobo. Ĉe tio ĉi, komprenoble, devis formiĝi grandega maso da akvaj vaporoj, ĉar la falado fariĝis en oceanon, kaj tiuj ĉi vaporoj falis post tio sur teron en formo de pluvaj fluoj. Kiel postsigno de tiu ĉi katastrofo aperis kliniĝo de l' tera akso kaj la elvokitaj per tio ĉi ŝanĝoj de klimato sur la tera globo: ĉe l' polusoj aperis eternaj glacioj. Per tia maniero la

nova hipotezo pri la deveno de Aŭstralio ne sole ne kontraŭparolas al faktoj, konfirmitaj per la scienco, sed eĉ klarigas multajn aperojn de l' pasinta kaj nuna vivo de l' tero, kiuj sen tiu ĉi hipotezo, ŝajnas al ni enigmaj kaj ne kompreneblaj.

Tradukis **Al. Semenov.**



## Ama sento.

(Rusa kanteto.)

La sorto nin eble disigos,  
Se estas la volo de Di':  
Vin eble ĉi tio ridigos,  
Ke kara mi estis al vi:

Sed eĉ kiam ami vi ĉesos,  
Alia fortiros vin sent',  
Neniam mi vin ekforĝesos  
Por unu feliĉa moment'.


Foriĝos de mi mia forto  
Kaj igos enuo je vi  
Suferi la batojn de l' sorto  
Estingos spiriton en mi.

Sed eĉ kiam vivi mi ĉesos,  
Ĉirkaŭos min tomba silent',  
Neniam mi vin ekforĝesos  
Por unu feliĉa moment'.

Kaj tiam vi min rememoros,  
Vizitos la tombon de mi.  
Kaj jam tro malfrue vi ploros  
Kaj velkos, kaj iros post mi.

Sed se Di' ĉielon permesos  
Aŭ punos inferna turment',  
Neniam mi vin ekforĝesos,  
Por unu feliĉa moment'.

Trad. **A Grabowski.**



## Reguleco kaj Unuformeco.

En la Marta numero, finante la artikolon "El Francujo", mi diris: "Ni ne devas forgesi, ke lingvo internacia ne estas precipe farita por la instruituloj aŭ scienculoj, kiuj ĝin apenaŭ bezonas: ĝi estas unue kaj speciale farita por la meze instruitaj homoj. Sed tiuj ĉi ne povas diveni multe da vortoj, tre facile komprenataj de klerulo. La vortaro estas do por ili la sola rimedo de kompreno. Sed, se ni uzos formojn aŭ vortojn eksterajn, kiujn oni ne trovas en niaj libroj, per kia maniero ni volas, ke ili komprenu?"

Amikoj, havu la bonecon pardoni al mi tiun ĉi ripeteton, sed ĝi estas necesa enkonduko al tio, kion mi tuj diros.

Por tute klarigi la pensojn esprimitajn pli supre, ni prenu praktikajn ekzemplojn. Samtempe ni vidos, ĉu oni estas prava, kredante pli bonan la formon aŭ vorton personan, per kiu oni dekliniĝas de Esperanta stilo absolute regula.

"Ed" estas pli internacia ol "kaj", pretendos iu. Mi ne trovas. Efektive, "kaj" estas uzata en *unu* lingvo regule: "ed" estas uzata en *unu* alia escepte. Sed vi diros, ke "ed" rememorigas la latinan kaj francan "et": mi konsentas por homo scianta unu el tiuj du lingvoj. Sed ĉu Esperanto estos ellernata nur de personoj konantaj la latinan aŭ la francan lingvon? Kiel do faros la aliaj? Ili serĉos vian "ed" en la vortaro, kaj ne trovante ĝin ili ne komprenos.

Tiel same kiel vi juĝas "ed" pli internacian ol "kaj", mi povas trovi

“il”, “nos”, “vos”, “kvande”, pli internaciaj ol “li”, “ni”, “vi”, “kiam”, kaj mi havas la rajton kredi, ke oni min komprenos, se, unuigante vian “ed” kun miaj pronomoj, mi faros la simplan frazon sekvantan: “Kvande nos koleris vos ĝojis ed kantis kin il”. Sed donu ĝin al Anglo, al Germano, al Ruso, sciantaj nur ilian patran lingvon, kaj vi vidos ĉu ili komprenos. Tamen mi uzis elementojn internaciajn. Mi ne finis. En mia frazo iu povus tre bone ŝanĝi “koleris, ĝojis, kantis”, per “iraskis, gaŭdis, ĉantis” trovante, ke tiuj vortoj estas preferindaj pro tiu aŭ alia motivo. Sed tiam homo neklera nenion pli komprenos en ĝi, niaj lernolibroj enhavante nenian el ĝiaj vortoj.

Nu, amikoj, kion mi faris en unu frazo, tion ni povos fari nesenteble en la tuta lingvo per almikso kaj anstataŭigo de formoj aŭ vortoj personaj. Ĉu ni deziras atingi rapide la antikvan Babelan konfuzon? Ĉu ni volas, ke nia lingvo disbranĉiĝu en multego da dialektoj aŭ pli ĝuste da ĵargonoj nur kompreneblaj al iliaj aŭtoroj?

Ne, certe ne. Ni do evitu severe ĉiun volan neregulaĵon en nia stilo. Ni oferu por la bono de nia afero ĉiun nacian, lingvistan aŭ personan preferon kaj ni uzu Esperanton tian kiel ĝi estas, eĉ en niaj privataj leteroj. Sed ni ekzameni iom ankoraŭ la demandon.


Estas pli simple, diros iu, tute forĵeti la akuzativon. Ha! — ni vidu. Kiel vi markos la diferencan inter “li saltas sur la tablo” kaj “li saltas sur la tablon”: inter “ŝi amas min pli ol li” kaj “ŝi amas min pli ol lin?” Vi diros simple “ŝi amas mi pli ol li” en ĉiu okazo, sen ia akuzativo. Sed ĉu vi kredas ke oni tre klare divenos kion vi volis diri? Kaj ankaŭ kiel vi esprimos nekonfuzeble la diferencan inter “Kiu mi vidas?” kaj “Kiu min vidas?”

Por forĵeti la akuzativon kaj resti logika kaj klara, oni devus meti du formojn por kelkaj pronomoj kaj kelkaj prepozicioj. Ni devus do elekti inter du formoj kiel ni elektas inter du kazoj. La plisimpligo ne ŝajnas al mi videbla.

Krom tio, per tia elĵeto ni forprenus el la lingvo mirindan flekseblecon por la esprimado de l' penso kaj la fidela traduko de multaj tekstoj. Fine vi devus difini regulojn por certaj aranĝoj de vortoj, kaj tiam ni komplikus kaj ne simpligus nian lingvon.

Skribante tion mi intencas nur turni la atenton de ĉiuj sur la necesecon esti regulaj kaj unuformaj en nia stilo kaj mi ne povas fini pli bone ol per la vortoj mem de nia kara doktoro: “Lingvo estas *pure kondiĉa signado de ideoj*, kiu povas plenumi sian difinon nur tiam, se ĉiuj uzas ĝin *severe egale*, — alie ĝi perdas ĉian sian sencan kaj celon kaj servas ne al reciproka komprenigado, sed nur al malkomprenigado.

**L. de Beaufront.**




### Bagateloj.

**Malfeliĉaj infanoj.** Antaŭ kelka tempo sin trovis en ia gazeto sekvanta anonco: “Oni serĉas servantinon, kiu povas kuiri kaj vesti infanojn”.  
Malfeliĉaj infanoj!

**Profunda distreco.** *Sinjoro* (al la poŝostelisto, kiun li ekkaptis je surtuta kolumo): “Mi kaptis vin, rabisto, ĉe la ŝtelado mem. Kion, diablo, vi serĉis en mia poŝo?”

*Stelisto:* Pardonu, bona sinjoro; mi estas tiel ofte en profunda distreco! Mi havis antaŭ malmulta tempo la surtuton, kiu tute similas la vian, kaj mi pro eraro kredis, ke ĝi estas la mia.

O. W. Z—z.





## Pri naturo kaj arto en kreado de lingvoj.

La kontraŭuloj de l' ideo de lingvo internacia ordinare argumentas, ke ĉiu tia lingvo devas necese esti *artefarita*, ke ĉio artefarita estas *kontraŭnatura*, kaj ke ĉio kontraŭnatura estas pli aŭ malpli *absurda*. Sekve la deziro krei artan lingvon internacian estas absurda himero de kelkaj vanaj kapoj, kiu meritas nenian gravan atenton. Per tiu ĉi simpla argumento ili volas konvinki la legantan publikon, ke ĉia ideo de lingvo internacia (aŭ, laŭ ilia difino, lingvo *tutmonda*) kontraŭas la logikon, la historion, la sciencan, kaj eble la religion, la politikon kaj ĉu ni scias, kion ankoraŭ? — Sed pli detala analizo de l' terminoj "natura" kaj "arta" montros al ni, ke tiuj ĉi sinjoroj ne sole ili mem eraras, sed intencas erarigi ankaŭ siajn kredemajn aŭskultantojn. Ni provos iom ekzameni tiun ĉi demandon.

Ĉiuj aŭdas kaj parolas ĉiutage pri "popoloj naturaj", pri "infanoj naturaj", pri "religioj naturaj", kaj neniu kuraĝos iam konfirmi, ke "infanoj naturaj" (t. e. bastardoj) estas pli estimataj ol infanoj leĝaj, ke "popoloj naturaj" (t. e. sovaĝaj) estas pli inteligentaj, ol popoloj kulturaj, aŭ ke "religioj naturaj" (fetiŝismo, paganismo) estas pli veraj kaj sanktaj ol la religioj teologiaj kaj filozofiaj.


Sed kiam la parolo tuŝas la demandon pri *lingvo*, oni tuj fariĝas "pli naturistoj ol la naturanoj mem". Ĉar la tuta filozofio pri *lingvoj naturaj* ekzistas sole en la fantazio de sinjoroj filologoj. La psikologio kontraŭe signas kiel *naturaj* sole la *impresojn*, kiuj estas komunaj al plantoj kaj al bestoj, la *perceptojn*, la *sentojn* kaj la *sonojn*, kiuj estas propraj al multaj bestoj, fine la *ideojn*, kiuj estas escepta propraĵo de l' homo sole.

Apenaŭ la homo eksentas bezonon esprimi siajn ideojn al la aliaj, li komencas elpensadi diversajn rimedojn por tiu ĉi celo. La unua rimedo estas la *mimiko*, kiu estas ankaŭ *la sola natura lingvo* — "natura", ĉar ĝi estas komprenebla al la tuta homaro, al surda-muta tiel same, kiel al posedanto ĉiujn homajn kapablecojn. Sed eĉ la lingvo mimika ne estas natura en tiu rilato, ke ĝi povas kaj devas esti en granda parto *okaza, kondiĉa* kaj tre *nekonstanta*. La nekonvenebleco de l' lingvo mimika (gesta) aperas precipe, kiam ni devas esprimi ian ideon abstraktan. Por eviti tian nekonveneblecon, la homoj serĉas helpon en diversaj sonoj, simile al multaj aliaj bestoj, kiuj akompanas per sonoj diversajn sentojn; sekve la vortoj de ĉiu lingvo estas *elpensitaj sonoj, uzataj por esprimi per ili diversajn ideojn*. Kiel tute *elpensitaj* sonoj, la vortoj havas nenian necesan *naturan* ligan kun la ideoj, kiujn ili esprimas, kaj laŭ la naturebleco "ĉiu vorto povas esprimi ĉiun ideon", kiel en algebro ĉiu litero povas esprimi ĉiun grandaĵon, kaj neniam vortoj havas pli grandan rajton, ol ĉiuj aliaj, por signi la nomon de Dio aŭ la nomon de diablo. La progreso, aŭ, — pli vere, — la "natura elektado" de vortoj de l' lingvo fariĝas sekve laŭ la leĝoj *fonetikaj, estetikaj* kaj *logikaj*, sed ĉiuj tiuj ĉi kriterioj mem apartenas, laŭ la konfeso de la pli severaj filologoj, al la regiono de l' arto kaj ne de l' naturo.

Sekve, se ni konsentas, ke en la radiko ĉiu homa lingvo estas arta, ni devas ankaŭ konfesi, ke lingvo kultura povas kaj devas necese esti pli inda ol ia lingvo sovaĝa (aŭ tiel nomita natura). Sed ĉiuj "kulturaj lingvoj" pli-perfektigas tre malrapide kaj tre malfacile, kaj la restoj superflujaj de ilia sovaĝa deveno (kiel la haroj sur la korpo de l' homo kultura) estas tiel mul-

aj, ke ni ne riskas diri tro grandan paradokson, dirante, ke ĉiuj lingvoj ekzistantaj estas pli-malpli sovaĝaj. Lingvo tute perfekta povas esti sole lingvo *arte kreita*. Sed la arto estas entute des pli *profunda*, ju pli ĝi sin apogas sur naturon, ĝin imitante: ĝi estas des pli *supera*, ju pli ĝi leviĝas super la naturo, ĝin perfektigante. — Lasu sinjorojn filologojn fosi la “radikojn de lingvoj naturaj”, kiel iliaj kolegoj, la arĥeologoj fosas en la subterejoj de Babilono. Sed se la unua provo de babilonanoj krei lingvon *tutmondan* malsukcesis dank’ al ĝia malprudenteco, tiel same, kiel ilia turo dank’ al tio, ke ili volis ĝin konstrui el “brikoj anstataŭ ŝtonoj kaj el asfalto anstataŭ argilo” (gen. XL3), ni posedas nun la arton arĥitekturan kune kun la arto leksikologa en multe pli granda mezuro. Ni havas nun turon de Eifel, duoble pli altan ol la piramido de Ĥeops, konstruitan el feraj traboj, kiun oni povas laŭ deziro transporti en Moskvon aŭ en New-York’on. Ni volas nun ankaŭ konstrui lingvon *kulturan*, lingvon *artan*, lingvon *internacian*, kiun ĉiu povos portadi kun si tra la tuta mondo. Vivu la arto humana, vivu la lingvo internacia!


L. Davidoriĉ (Odeso).



## Surskribo, trovita en ruinoj Persepolaj.

Gardu vin	{	diri	ĉion,	{	vi scias	ĉar	{	diras	ĉion,	{	li scias	tion,			
		fari			vi povas			faras			li povas		tiu	diras	kion
		kredi			vi aŭdas			kredas			li aŭdas		tre	kredas	li
		juĝi			vi vidas			juĝas			li vidas		ofte	juĝas	ne
		konsumi	vi havas	konsumas	li havas	konsumas	devas.								

Trad. D-ro D. Marignoni (Crema.)



## La servosoldato.

(El *Guy de Maupassant*).

La tombejo, plenigata de oficiroj, elvidis kiel floranta kampo. Ruĝaj kepoj kaj pantalonoj, oraj galonoj kaj butonoj, glavoj, ŝultrorubandoj de oficiroj de la ĉefa stabo, ŝevronoj de pafistoj kaj de husaroj briletis inter la tomboj, kies blankaj kaj nigraj krucoj etendis siajn malgajajn, ferajn, marmorajn aŭ lignajn manojn super la morta loĝanaro de l’ tombejo.

Oni ĵus enterigis la edzinon de regimentestro Limuzen. Ŝi dronis, dum baniĝo antaŭ du tagoj.

L’ enterigiro estis finita. La pastraro foriris, sed la regimentestro, subtenata de du oficiroj, staris antaŭ la kavo, en kies profundaĵo li vidis ankoraŭ la ĉerkon, kaŝintan la jam dismetiĝintan korpon de lia juna edzino.

Preskaŭ jam maljunulo, altkreska, maldika, kun blankaj lipharoj, li edziĝis antaŭ tri jaroj kun orfino, filino de lia mortinta amiko, regimentestro Sortis’.

Kapitano kaj leŭtenanto, sur kiuj la vidvo sin apogis, penis forkonduki lin. Sed li ne volis foriri. Kun okuloj, plenaj de detenataj per penego larmoj, li mallaŭte murmuretis:

— Ne, ne, ankoraŭ iomete.

Li daŭrigis stari kun tremantaj piedoj sur la rando de tiu ĉi kavo, kiu ŝajnis al li senfundaĵo, en kiun enfalis lia koro kaj vivo, ĉio, kion li havis en la mondo.

Subite aliris la generalo Ormon', prenis la regimentestron per lia mano kaj, fortirante lin preskaŭ perforte, diris:

— Sufiĉe, sufiĉe, mia fidela amiko, ne estas bone stari tie ĉi.

La regimentestro obeis kaj iris domen.

Malferminte la pordojn de sia kabineto, li ekvidis sur sia skribtablo leteron. Li prenis ĝin en manon, kaj estis preta ekfali pro mirego kaj maltrankvilo: li rekonis la skribadon de sia edzino. Sur la letero estis poŝta sigelo kun tia sama tagdato. Li formetis la koverton kaj eklegis:

“Patro! Permesu al mi ankoraŭ unu fojon nomi vin patro, kiel antaŭe. Kiam vi ricevos tiun ĉi leteron mi estos mortinta kaj sub la tero. Tiam vi eble povos pardoni min.

Mi volas nek moligi vian koron, nek pligrandigi mian kulpon. Mi volas per tuta sincereco de virino, kiu post unu horo mortigos sin, diri al vi la tutan kaj malfalsan veron.

Kiam vi edziĝis kun mi pro grandanimeco, mi donis al vi mian koron pro dankemeco kaj amis vin per mia tuta infana animo. Mi amis vin preskaŭ tiel same, kiel mian patron, preskaŭ tiom same. Unufoje, kiam mi sidis sur viaj genuoj kaj vi kisis min, mi nevole eldiris la nomon: patro! Tio ĉi estis neatendita, senpera ekkrio de mia koro. Kaj efektive, vi estis por mi patro, sole patro. Vi ekridis kaj diris al mi:

— Nomu min tiel ĉiam, mia infano, tio ĉi plaĉas al mi.

Poste ni venis en tiun ĉi urbon kaj — pardonu min, patro — mi enamiĝis. Ho, mi longe bataladis, preskaŭ du jaroj, poste cedis, fariĝis kulpa kaj malĉasta.

Kiu estis li? Vi ne divenos. En tiu ĉi punkto mi estas tute trankvila, ĉar ĉirkaŭ mi ĉiam estis dekduo da oficiroj kiujn vi nomis miaj stelaroj.

Patro, ne penu sciiĝi lian nomon, kaj ne malestimu lin. Li faris tion, kion farus ĉiu en lia situacio kaj krom tio, mi estas certa, li amis min per tuta koro.

Atentu: unufoje ni difinis kunvidon sur la insuloj de Skolopoj, la konata de vi insuleto post la muelilo. Estis necesa al mi atingi ĝin naĝante, kaj li promesis atendi min inter l' arbetaĵoj kaj poste resti tie ĝis la vesperveno, ke oni lin ne vidu. Apenaŭ ni kunvenis, subite l' arbetaĵoj dismetiĝas kaj ni vidas Filipon, vian servosoldaton, kiu gardis nin. Mi sentis ke mi estas pereigita kaj ekkriis. Tiam li — mia amiko — diris al mi:

— Naĝu trankvile domen, mia kara, kaj lasu min kun tiu ĉi homo.

Mi fornaĝis sed estis tiel maltrankviligita ke mi estis en danĝero droni. Mi venis domen, atendanta ian teruraĵon.

Post unu horo, Filipo renkontinte min en koridoro, murmuretis al mi:

— Sinjorino, mi estas preta al vi servi, se vi bezonos transdoni leteron.

Mi ekkomprenis ke li estis subaĉetita de mia amiko.

Mi efektive donadis al li leterojn — ĉiajn miajn leterojn. Li forportis ilin kaj alportis respondojn.

Tio ĉi daŭris ĉirkaŭ du monatojn. Ni konfidis al li tiel same kiel vi.

Kaj jen kio okazis unufoje. Mi alvenis al tiu sama insuleto, tute sola, kaj renkontis tie vian servosoldaton. Li atendis min kaj anoncis, ke li denuncos al vi ĉion kaj donos al vi la leterojn, ŝtelitajn de ni, se mi ne donos min al li.

Ho, mia patro! Min atakis timo, terura, malnobla, malinda timo, kaj precipe antaŭ vi, mia kara kaj bona, kiun mi trompadis, kaj ankaŭ timo pro

li, ĉar vi lin mortigus, eble ankaŭ pro mi mem — ĉu mi scias? Mi estis kiel freneza, mi volis resubaĉeti tiun ĉi friponon, kiu ankaŭ amis min — kia malhonoro!

Ni virinoj, estas tiel malfortaj, ke ni perdas la kapon multe pli rapide ol viroj. Kaj poste, unu fajon falinte, oni falas ĉiam pli malsupre. Ĉu mi sciis, kion mi faris? Mi komprenis nur tion, ke unu el vi kaj ankaŭ mi devas morti — kaj mi donis min al tiu ĉi bruto.

Vi vidas, patro, ke mi ne penas senkulpigi min.

Tiam, tiam... tiam okazis la atendebla. Li min perdadis ree kaj ree, kiam li volis per lia minacado. Li ankaŭ estis mia amanto, tiel same kiel la alia — ĉian tagon. Ĉu tio ĉi ne estas terura? Ho, kia puno, patro!

Tiam mi diris al mi: estas necesa morti. En vivstato mi ne povus konfesi al vi tian krimon; mortinta — mi timas nenion. Mi ne povis ne morti: nenio forlavus de mi la koton. Mi ne povis jam ami kaj esti amata. Al mi ŝajnis, ke mi kotigis ĉiujn, nur donante la manon.

Baldaŭ mi iros min bani kaj ne revenos.

Tiu ĉi letero, difinita al vi, estos donita al mia amanto. Li ricevos ĝin post mia morto kaj, nenion komprenante, donos ĝin al vi, plenumante mian lastan deziron, kaj vi tralegos ĝin, reveninte de la tombejo.

Adiaŭ, patro! Al mi restas nenion diri al vi. Agu kiel vi volas kaj pardonu min."

La regimentestro forviŝis la ŝviton, elirintan sur lia frunto. La trankvileco, kiu estingis lin en tagoj de bataloj, revenis al li.

Li eksonoris. La servanto eniris.

— Venigu Filipon — li diris.

Poste li malfermis la keston de la tablo.

La servosoldato eniris preskaŭ tuj.

Tio ĉi estis altkreska soldato kun flavruĝaj lipharoj, ruza vizaĝo kaj malicaj okuloj.

La regimentestro rigardis rekte en lian vizaĝon.

— Tuj vi diros la nomon de mia edzinamanto.

— Via regimentestra...


Li prenis el la malfermita kesto pistoleton.

— Rapide, vi scias, ke mi ne amas ŝerci.

— Regimentestro, tio ĉi estas... la kapitano Sent-Alber'.

Apenaŭ li eldiris la nomon, flamo ekbrilis antaŭ liaj okuloj, kaj li falis teren, kun kuglo en la frunto.

Trad. A. Kofman.



## Savigo de sinmortigo.

(Nikarĥus).


La avarulo Dinarĥo volis hieraŭ pendigi,

Kaj de la morto proksima savis lin unu obolo\*),

Ĉar tiom kostis la ŝnuro; ĝin pli malkare ŝnuristo

Vendi ne volis. — Li pensas pri morto ne tiel karega.

A. Kofman.



\*) *obolós*, malgranda monero greka.

# Faust.

Tragedio de *W. Goethe*.

Tradukis *A. Kofman*.

## Dedico.

Vi venas re, malklaraj figuraroj.  
Nebule iam ĉirkaŭintaj min.  
Ĉu eble nun mi faros vin pli klaraj?  
Ĉu min ekregas re l' antaŭa klin'?  
Nu bone, bruu vi, fantomaj maroj.  
Vaporoformaj song'aj, sen difin'?  
Tremiĝas mia brusto junigita,  
De via sorĉa blovo enspirita.

Kun vi al mi revenas la ravanta  
Ombraro, multe kara al memor'.  
Kaj kiel dolĉa eĥo, nun mortanta,  
L' unua amo iĝas en la kor'.  
L' animo ĝemas, ree eraranta.  
Ĝi ree laŭte plendas pri dolor'  
Kaj pri la multamanta amikaro,  
Prenita for de l' kruda vivo-maro.

Vi, kiuj ĝojis je komencaj sonoj  
De miaj kantoj, vi ne estas pli.  
Vi estas en tre foraj regionoj.  
Kaj mortis, ha! l' unua melodi'.  
Mi kantas nun al frenda ar'-personoj.  
Kaj min timigas eĉ la laŭdo-kri'.  
Kaj vi, amikoj de l' amata rondo,  
Ĉu vivas vi ankoraŭ en la mondo?

Min puŝas re l' antaŭaj koraj klinoj  
Al la fantoma mondo de dolor'.  
Min re ĉirkaŭas tonoj sendifinaj.  
Eola harpo sonas en la kor';  
Min prenas timo, larmoj longobstinaj.  
En mi moligas ree la humor'.  
Kaj la havato iras malproksimen.  
Kaj la perditio flugas en animon.

## Prologo en la teatro.

DIREKTORO. — POETO. — ĜAJGISTO.

DIREKTORO.

Vi ambaŭ, kiuj per subten'  
Min helpis kontraŭ malprosperoj.  
Eldiru nun per opinioj veraj  
Pri nia nuna entrepren'.  
Mi tre dezirus plaĉi la amason:  
Ĝi vivas kaj ĝi helpas vivi nin.  
La sceno estas preta, kaj enlason  
Atendas ĉiu kun anima klin'.  
Jen ili venas, levias siajn brovojn.  
Soifas aŭdi mirindaĵojn novajn.  
Ni scias kiel agi je publik',  
Sed nun mi sentas grandan embarason,  
Ĉar kvankam fremda al la estetik'  
Ĝi tamen legis multe, grandan mason.  
Kiele trovi por bezona uz'  
Novaĵojn laŭ enhavo kaj amuz'?  
Mi certe tre plezure vidas virojn  
Alflui al teatro, kiel mar',  
Kaj puŝi, eldonante laŭt-sopirojn,  
Teatran pardonon sur ŝtupar'.

Ariĝi apud la bileta kaso  
Kiele dum malsato eĉ bakist',  
Kaj krii pri biletoj en amaso  
Kaj brui sen laciĝo, kun persist'.  
Ho, nur poeto povas fari tion.  
Mi petas vin, elmontru arton vian.

POETO.

Ho, lasu tiun multkoloran aron.  
Ĉe kies vido velkas la geni'  
Ne puŝu min en tiun bruon maron.  
En kiun kontraŭvole falas ni.  
Ne, ne, mi celas dolĉan muz-altaron.  
Ĉe kiu floras pura poezi',  
Kaj amo, amikeco — beltrezoroj  
De dia beno — iĝas en la koroj.  
— Ha, eĥo, en la brusto naskiĝanta.  
Elparolebla per la buŝ' aŭ ne.  
L' amaso ĉion estas sufokanta  
Ĉar nur l' estantan vidas la plebe'.  
Kaj sole nur post tempo longdaŭranta

Ekbrilas en triumfo la ide'.  
 Brilaĵo taŭgas sole por momento  
 Kaj nemortema estas nur talento.

GAJIGISTO.

Ha, nemortemo! Kia grand-afero!  
 Se min okupus tiu ĉi ĥimero.  
 Ĉu portus iu gajon al publik'?  
 Sed ĝi postulas tion kaj, amik',  
 Mi diras vin, ĝi estas tute prava:  
 Nuntempo estas io tro multgrava,  
 Ke ĝin malŝatus homo brava.  
 Al kiu estas klara lia rol',  
 Ĉi tiun ne konfuzos la amaso;  
 Ju pli multnombra estos la popol',  
 Des malpli estos lia embaraso.  
 Kuraĝon! Antaŭiru fantazi',  
 Kaj poste — ĝia ĥoro: la prudento,  
 Saĝeco, amo, ĉia kora sento  
 Kaj sensencaĵo — nepre tio ĉi!

DIREKTORO.

Precipe pli da aventuroj!  
 Ĉar homojn logas scenoj kaj figuroj.  
 Se multkolora estos la kanvas'  
 Kaj se kun miro homoj vin okulos,  
 La mondo tuj je venko vin gratulos:  
 L' amason oni prenas nur per mas'.  
 Vi donu multformaĵon: en ĉi-tio  
 Por ĉiu certe entroviĝas io;  
 El multdonaĵo multaj homoj prenas,  
 Kaj ĉiu tre kontente domen venas.  
 Ne unuecon! Donu vi al ni  
 Nur miksitajon, kaj mi vin certigas —  
 Multipli facile estas tio ĉi,  
 Pro kio vi la verkon unuigos?  
 L' amaso ĝin ja ree ekpecigos.

POETO.

Malestiminda estas tiu far',  
 Ĝi ne konvenas al artisto vera.  
 La makulaĵo de skribistoar',  
 Mi vidas, ŝajnas al vi pli prefera.

DIREKTORO.

Riproĉo via ne ofendas min.  
 Por agi bone, kun utilo  
 Bezona estas la plej ĝusta ilo,  
 Kaj nur per ĝi vi venos al la fin'.  
 Per kiuj, diru, viaj verkoj estas?  
 La unu venas sole pro enu',  
 L' alia manĝon tie ĉi digestas  
 Kaj — kontraŭ kio mi la plej protestas —

La tria venas sub gazetinflu'.  
 Mi vidas nur scivolon trivialan.  
 Farantan el teatro maskobalon;  
 Virinoj venas, ornamente sin,  
 Kaj ĉiu estas nova aktorin'.  
 Ĉu tia aro povas kun vi revii?  
 Ne, vi bezonas vin mallevi.  
 Rigardu de proksime ĝin,  
 Ĝi estas tro malvarma, sen rafin'?  
 La unu post la bela drama sceno  
 Revenas al la kartolud',  
 La dua iras al malĉastobud',  
 Kaj pro ĉi-tiuj homoj — kun soleno  
 Alvoki muzojn de l' Olimp-areno!  
 Mi diras vin, elpensu por la ar'  
 Miksaĵon da aventurar',  
 Konfuzu ĝin en nebulaĵa mar'.  
 Ĝin kontentigi — ho, sinjoro!  
 Ĉi-tio estus granda van-laboro.  
 Sed kial via ekkonfuz'?  
 Ĉu eble vin enspiras via muz'?

POETO.

For, serĉu vin alian sklavon!  
 Naturo donis al poet'  
 Plej belan bonon, plej potencon havon.  
 Kaj malhonoru tian flamon ravan  
 Pro via malindega bezonet'!  
 Per kio li potencas super koroj  
 Kaj regas super ĉia element'?  
 Ĉu ne per harmoniaj belsonoroj,  
 Tiritaj el la universaj ĥoroj,  
 Laŭt-ĉiĝantaj en poeta sent'?  
 Se l' Park'-faden', faden de l' homa sorto  
 Sencele ruliĝadas sur ŝpinil',  
 Se ĥaosigas per potencia forto  
 Senordo, malkonsento, maltrankvil', —  
 Ho, kiu la ĥaoson re ordigas  
 Kaj metas ritmon en la partojn re?  
 La specojn per komuna leĝo ligas,  
 Per harmonia sono kaj ide'?  
 Ho, kiu en vi movas l' am-pasion,  
 Dolĉigas la vesperon de somer',  
 Disŝutas la printempajn florfoliojn,  
 Semante ilin sur la ter'  
 Por ravi amatinojn viajn?  
 Ho, kiu el la simpla arbverdaĵ'  
 Elplektas laŭran kronon-rekompencan  
 Kaj kreas diojn sur Olimp-supraĵ'  
 Kaj per si mem elmontras hom-potencan?

GAJIGISTO.

Elmontru do, efektivigu ĝin  
 Kaj poeziu kun anima klín'.  
 Pri tio, kiel venas al ni amo,  
 Kiele oni ekrenkontas sin,  
 Kunvenas, konatiĝas, kaj al fin'  
 Leviĝas en animo hela flamo;  
 Kiele venas ĝojo kaj dolor'.  
 Kiele post feliĉo venas plor'.  
 Kaj jen — per unu fojo kaj subite  
 Finiĝas la roman' neatendite.  
 Ekverku tian specon por la scen',  
 Multuzu faktojn el la mond-aren'.  
 La homoj vivas, sed ne konsideras.  
 Priskribu ilin, kaj — vi tuj prosperas.  
 En multaj scenoj — unu komprener',  
 En falsamaso — sensignifa ver'!  
 Jen kiel oni faras la likvoron,  
 Plezurigantan mondan koron.  
 La junaj homoj, la homara flor',  
 Al via verko venos ĉerpi veron,  
 Per ĝi nutrados sian karakteron  
 Melankolia delikata kor'.  
 Vi povas verki kion ajn, —  
 En ĝi junul' nur vidos propran senton,  
 La unu — gajon, tiu ĉi — turmenton.  
 Ĝis nun junecon, kvazaŭ ia gajn',  
 Tre plaĉas ploro, rido, revo, ŝajni';  
 Maljuna homo estas postulema,  
 Nur en junulo vivas dankosemo.

POËTO.

Redonu do al mi la jarojn  
 De la juneco, de enspir',  
 En kiuj sonis kanto-arojn  
 Seninterrompe mia lir';  
 En kiuj mi en nobulaĵoj  
 Serĉadis sur la tera voj'  
 Revatan specon de mondaĵoj,  
 Kaj floroj min pri mirindaĵoj  
 Parolis kun interna ĝoj'.  
 Mi havis nulon, sed sufiĉe havis,  
 Celadon al la vera sci'  
 La ĉarmon de la revo-papili'  
 Kaj ŝajnon, kiu mian koron ravis.  
 Redonu tion ĉi al mi,  
 La forton de la kora flamo,  
 La fajron de la am'-pasi'  
 La potencegon de l' malamo,

La ĝojon, riĉan je turment',  
 La jarojn kun l' antaŭa sent'!

GAJIGISTO.

La junajn jarojn vi bezonas  
 Nur kontraŭ malamikoj en milit',  
 Aŭ se virinoj sin fervore donas  
 Al vi, ilia favorit';  
 Se malproksima estas la celato  
 Kaj atingobla nur per granda pen',  
 Aŭ se post balo multdancata  
 Vi iras drinki ĝis maten'.  
 Sed ludi liron de ĉielo  
 Agrable, dolĉe, kun pasi',  
 Laŭ antaŭ difinita celo  
 Kun dolĉe-falsa fantazi', —  
 Tiele agi, tiel nin flamigi  
 Grizeco ankaŭ povas kun pasi'.  
 Neniel ĝi nin povas infanigi:  
 Sen ĝi infanoj ĉiam estas ni.


DIREKTORO.

Sufiĉe da parola bruo!  
 Anstataŭ via vortkolei'  
 Kaj disputado superflua  
 Ni iru fine al afer'.  
 Pro kio multparoli la faroton?  
 Timema koro havas unu loton:  
 Ĝi estas ĉiam sen prosper'.  
 Se vi poeto estas en anim',  
 Vi regu vian arton sen ektim':  
 Vi scias, kion ni bezonas,  
 Nur forta trinko plaĉas nin,  
 Kaj tuj! se nun vi ĝin ne donas,  
 Ni morgaŭ pli ne volas ĝin.  
 For prokrastado, malrapido!  
 Se montras sin al vi okaz',  
 Vi ĝin altiru kun sinfido,  
 Altiru ĝin per ĝia naz'.  
 Sur nia sceno oni provas  
 Agadi kiel oni povas.  
 Agadu tiel ankaŭ vi.  
 Ho! Vi ne ŝparu la maŝinojn,  
 Nek ĉarmojn de dekoraci',  
 Nek steloarojn, luminojn.  
 Potencu sen timema ĝen'  
 La akvon, fajron, birdon, beston  
 Kaj universon plen-majestan,  
 Kaj metu ĉion sur la scen',  
 Kaj flugu fine tra la tero  
 Al la ĉielo kaj infero.

## Al nia abonantaro.

Kiel devas scii la plejmultaj el niaj abonantoj, la redaktoro de nia gazeto loĝas malproksime de la loko, kie estas presata la gazeto, kaj la sendado de la provaj presaĵoj sekve estas kunligita kun multaj malfacilecoj. Kaj nun unu tia sedaĵo ŝajnas eĉ perdita en la vojo. Tio ĉi nun kaŭzis, parte ke la gazeto ne povis esti eldonita en ĝusta tempo, kaj parte ke ĝi ne enhavas la 32 paĝojn promesitajn sur la unua paĝo de tiu ĉi numero. Ni esperas, ke tia malhelpo ne venos en la estonta tempo.

*La eldonantoj.*



### Bagateloj.

**Bone rebatite.** Konata verkisto ekkriis unutage "hm!" post amiko, kiun li vidis malproksime sur la strato. Dando, kiu tion ĉi aŭdis, ofendita sin turnis kaj ekvokis kun la manoj sur siaj flankoj: "Kiel vi povas riski krii 'hm!', kiam *mi* iras en la strato?" La verkisto, imitante la gestojn de l' dando, kriis per tia sama malafabla tono: "Kaj kiel vi povas riski iri en la strato, kiam *mi* krias 'hm'?"

**Interesa legendo.** La sekvanta kunparolo, laŭrakonte, ekzistis inter angla vojaĝanto kaj ia maristo trovante sin sur amerika vaporŝipo:

"Tio estas ja Black Mountain?"

"Jes, sinjoro; la plej alta monto, kiu ekzistas ĉe Lake George."


"Ĉu oni havas ian historion aŭ legendon pri tiu ĉi monto?"

"Jes, oni rakontas, ke amanta paro unufoje surrampis de tiu ĉi flanko sur la pinton de l' monto, sed neniam returnis."

"Ĉu efektive! Nu, kio do fariĝis el ili?"

"Ili iris malsupren sur la alia flanko."

*P. N—n.*



## Unu horo da dormo.

(El lingvo portugala.)

En bela somera tago kuŝiĝis knabeto sur herbo, proksime de l'rando de l' vojo, sub ombro de unu maljuna kaŝtanujo.

Post mallonga tempo pasis veturilo laŭ la vojo, kiu estis klinega kaj plena je ombro. Unu riĉa komercisto deiris de l'veturilo kun sia edzino kaj, por doni movon al la krusoj, ambaŭ sekvadis piedire la veturilon, dum la ĉevaloj ĝin trenadis malrapide.

— Bela infano, diris la virino, kiel li bone dormas! Liaj haroj, en bukloj, tiel ĝentile ornamas tiun frunton, ankoraŭ ne ombrigitan de ia malpura penso... Pro la vesto li ŝajnas al mi ido de malriĉulo. Ni havas nenian infanon... ĉu vi volas, ke ni eduku tiun ĉi knabeton?

— Li estas efektive bela, respondis la edzo, kaj mi donus niajn bienojn prefere al li ol al niaj parencoj. Sed li estas tre juna, kaj ni komencas jam maljuniĝi; eble ni eĉ ne vidos lin, kiam li atingos plenaĝon. Krom tio, estus necese veki lin por scii, kie loĝas liaj gepatroj, serĉi ilin kaj trakti kun ili. Ĉio tio devigus nin elspezi multe da tempo, kaj, kiel vi scias, ni devas rapidi.

La edzino ĵetis al la knabeto malgajan rigardon.

— Estu laŭ via volo..., diris ŝi, profunde sopirante.

Paste pasis knabino blanke vestita, la haroj al vento. Nenio ankoraŭ maltrankviligis ŝiajn naivajn songojn; ŝian zonon ĉirkaŭadis blua rubando.

Ŝi aŭskultadis birdon, kiu kantis starante sur branĉo, kaj ne sciis, kial



la notoj de l' flugila kantisto, malicaj kaj mokantaj, impresadis ŝian koron!...

Ŝi haltis kaj murmuris:

— Bela infano, kiel trankvile kaj senzorge vi dormas! Vi estas bela kaj la venteto karesas vin. Pli malfrue vi devos kontraŭstari al la homoj; via tiel blanka vango fariĝos iom nigreta. Tabako difektos vian voĉon kaj nigrigos viajn dentojn; tondiloj falĉos la buklojn de viaj haroj; zorgoj plenigos vian frunton per sulkoj, kaj aĝo kurbigos vian talion. Kaj tiam, kiel mi estos ankaŭ? Ho! Se vi povus min ami, kiel bela estus nia estonteco!

Kaj, ĉirkaŭrigardinte timeme, ŝi kliniĝis, kisis la lipojn de l'knabeto kaj forkuris, tre rozkolorita kaj kvazaŭ miregita pro tia kuraĝo.

Tiam el proksima arbaro eliris du rabistoj: atakinte kaj rabinte la veturilon, ili komencis fari la dividon.

— Ho! — diris unu el ili; — tiu knabo povas denunci pri ni.


Kaj li sin preparis por mortigi la malfeliĉan infanon, celante jam per ponardo lian bruston, kiam la alia detenis la brakon de l' mortiganto.

— Rimarku, ke li dormas, nenion vidis. Ni permesu, ke li vivu.

Kaj ambaŭ rabistoj reiris en la profundajojn de l' arbaro.

La knabeto vekigis ridetante. Li dormis nur unu horon, sed tiu horo resumis la tutan homan ekzistadon, ĉar la sorto kunligis en ĝi la amon, la riĉecon kaj la morton.

Trad. **Costa e Almeida.**



## Portugalaj popolaj kantetoj.

I.

Pro amo mi perdis Dion,  
Pro amo min perdis mi!  
Nun mi estas forlasita  
Sen Di', sen amo, sen vi!

II.

Mi ĵuradis plu ne ami,  
Ĉar perfidis min amanta,  
Sed okuloj viaj belaj  
Faris min malverĵuranta!


III.

Lunbrilo de l' mezanokto,  
Vi kaŭzas malĝojon al mi!  
La pardon de l' amatino  
Mi ne transiras pro vi!

IV.

Kiam mi dromiĝos foje  
En ondoj de via har',  
Tiam vi povos sciigi  
Esti ondoj ekster mar'!

Trad. **Albano de Magalhaes.**



## De niaj abonantoj.\*)

— Traleginte en la marta numero de la gazeto "Lingvo Internacia" artikolon de s-ro N. Kazi-Girej, mi tute konsentas la opinion, esprimitan de la aŭtoro kaj mi nur miras, kial tiu ĉi demando ne estis ĝis nun vekita kaj priparolita en esperanta gazeto. Jes, efektive tio ĉi estas afero de granda

\*) En tiu ĉi nova rubriko ni presados mallongajn notojn, rimarkojn, demandojn k. t. p., kiujn al ni sendas niaj abonantoj kaj kiuj estas tre malgrandaj por esti presitaj en la formo de apartaj artikoloj. Ni petas niajn abonantojn partopreni en tiu ĉi rubriko.

*Red.*

signifo por nia lingvo, precipe en la unuaj paŝoj de ĝia disvolvo, kiam ĝi ankoraŭ ne al militis al si fortikan situacion kaj tial povas subfali al la influo de diversaj homoj. En la nuna tempo la progreso de lingvo internacia dependas de la nombro da personoj, aliĝantaj al ĝi kaj laborantaj por ĝia utilo; sed ofte okazas, ke homoj, dezirantaj aliĝi al tiu ĉi afero, renkontas en la komenco mem de l' ellernado multajn malfacilaĵojn dank' al la malprospere verkitaj lernolibroj aŭ, pli ofte, dank' al la nekompreneble skribitaj esperantaj verkoj. Al kelkaj personoj tia solvado de renkontataj malfacilaĵoj tiel tendas, ke ili fine forlasas la lingvon kaj forgesas pri ĝi. Tial estus tre bone, se ĉiuj verkoj presotaj estus sendataj al iu kompetenta esperantisto, kies bona kaj senriproĉa stilo estas konata, por trarigardo kaj korektado.

La lernolibroj de nia lingvo ankaŭ ne estas senriproĉaj. Tiel ekz. oni devus aldoni al la rusa lernolibro (verko N:o 77) la alfabeton de skribaj esperantaj literoj, ĉar la presita tie presa alfabeto ne povas kontentigi multajn el la rusaj, kiuj scias nenian alian alfabeton krom sia rusa. Mi mem havis okazon skribi por kelkaj rusoj, dezirantaj lerni la lingvon internacian, la alfabeton de skribaj esperantaj literoj. Oni povus presi tiun alfabeton sur apartaj folietoj kaj enmetadi ilin en la lernolibron.

Tion ĉi mi skribas sole pro la deziro turni la atenton de niaj amikoj al tiuj ĉi punktoj kaj mi pensas, ke ĉiu amiko konsentos kun mi

A. I. Semenov

Rusujo, st. Zemetĉino, Syzrano-Vjaz. ĵel. doroga.

— La ĵurnalo pola "Tygodnik" en la fino de la N:o 13 diras, ke en la lingvon Esperanto estas jam tradukitaj multaj verkoj de diversaj aŭtoroj, ekz. de Tolstoj, de Shaekspir, de Sienkiewicz, de Puŝkin, Prus k. t. p. kaj aldonas, ke tiuj ĉi tradukoj ne estas io alia, ol la "profunacio", ĉar en la lingvon internacian oni nenian povos bone tradukadi la verkojn de alilandaj aŭtoroj, ĉar la lingvo Esperanto estas tre malriĉa je vortoj kaj esprimoj.

Videble la redaktoro de tiu ĉi gazeto, s-ro Josef Wolf, tute ne konas nian lingvon kaj vidis nenian tradukon el tiuj, pri kiuj li skribas.

A. Zakrĵevski.

Rusujo, Smolensk. Oficerskaja Sloboda.

\* \* \*

## Adresaro de niaj abonantoj.

### Rusujo.

- |   |  |
|---|--|
| 369. A. Idelson. <i>Nikolajev</i> (gub. de Herson).                                       | 377. T. Ŝĉavinski. <i>Melitopol</i> (gub. Tavriĉeskaja).                         |
| 370. N. Sutkovoĵ. Pskovskaja, 10, loĝ. 18. <i>Peterburg.</i>                              | 378. J. Haberhauer. <i>Troickosavsk</i> (prov. Transbajkala).                    |
| 371. V. N. Gabbe. Troickaja, 6, <i>Odessa.</i>  | 379. A. Blumental, d-ro <i>Pinsk</i> (gub. de Minsk).                            |
| 372. D-ro I. D. Ostrovski. <i>Jalta.</i>  | 380. S. Vonski, Tavriĉeskaja. 26. <i>Nikolajev</i> (gub. de Herson) [Feldŝar].   |
| 373. S. F. Krokos. <i>Kremenĉug</i> [Pesockij].   | 381. H. I. Morev. <i>Kremenĉug.</i> [V. Halperin].                               |
| 374. P. U. Vasiljev, pastro. <i>Kremenĉug.</i>  | 382. F. M. Zamenhof, farmaciisto. Sanigilejo de s-ro Kejlin. <i>Simferopolo.</i> |
| 375. Biblioteka Obŝĉestvennaho Sobraniĵa, <i>Kremenĉug.</i>                               | 383. D. K. Baranov. <i>Mariinskaja</i> , 22. <i>Harĉkov.</i>                     |
| 376. Redakcio de "Volinskija Ĵeparĥialnija Vedemosti". <i>Kremenec</i> (gub. Volinskaja). |  |

384. **M. M. Smolin.** Naberejnaja kanala, d. Dmitrievoj. *Astrahan.*
385. **S. E. Rakovski.** Kostelnaja, 7. *Kiev.*
386. **K. I. Ber.** Sadovoje zavedenije, str. Hersonskaja, pr. domo. *Kremenčug.*
387. **N. S. Simonovskaja,** selo *Kursarka* (gub. de Stavropel).
388. **I. L. Pučkovski.** *Kansk* (gub. Jenisejskaja) [Espero].
389. **S. Borovko.** Pavlovskoje zdanije, N:o 40. *Odessa.* [N. Borovko].
390. **V. N. Devjatnin,** m. *Podberezje,* st. *Gedrojci* (gub. de Vilno).
391. **V. V. Sokolov.** *Taman* (prov. de *Kuban*).
392. **P. Korman.** Str. Moskovskaja, d. de Timéinov, p. adr. s-ro Barski. *Nikolajev* [Feldšar].
393. **M. Andrjееvski,** d-ro. *Kobrin* (gub. de Grodno).
394. **A. M. Kefeli,** Karaimskij hazzan. *Kremenčug.*
- 395—396. **V. V. Ščepetilnikov.** Kancelario de l' bataliono. *Krasnojarsk* (gub. Jenisejskaja).
397. **A. N. Mišarin.** Kancelario de l' bataliono. *Krasnojarsk* [V. Ščepetilnikov].
398. **A. A. Savvinih.** Str. Uzenkaja, d. de Hoštovt. *Krasnojarsk.* [V. Ščepetilnikov].
399. **D. T. Rastorguev,** instruisto de virina gimnazio. *Krasnojarsk* [V. Ščepetilnikov].
400. **J. A. Jivotovski.** Staroportofrankovskaja 80. *Odessa.*
401. **M. Chrzanovskaja.** *Belostok* (gub. de Grodno).
- 402—404. S-rino **S. I. Vogau.** *Rovnoje* (gub. de Samara).

## ANONCOJ.

### S-ro J. A. Jivotovski

instruas senpage personojn, dezirantajn ellerni la lingvon Esperanto. *Odessa, Staroportofrankovskaja 80.*

### En la propagandaj broŝuroj

franca nr. 86 kaj rusa nr. 85 estas presitaj sciigoj, ke verkoj nr. 12 (Aldono al la Dua Libro) kaj nr. 56 (Lernolibro por Rusoj) ne ekzistas jam en vendo.

Sed la lastajn nevenditajn ekzemplerojn oni povas ricevi de s-ro Makuŝin laŭ la adresoj:

- 1) Rusujo, Tomsk, Magazeno de Makuŝin aŭ
- 2) Rusujo, Irkutsk, Magazeno de Makuŝin.

**M**i deziras korespondadi en Esperanto kun amikoj de nia lingvo. **V. Fedorovskij, Moskvó, Rusujo,** Chistijé prudi, Milnikov pereulok, d. Korovina, loĝ. N:o 21.

### Korespondadi esperante

kun alilandaj personoj deziras sinjoro **I. Portnov, Kamyŝin,** gub. Saratov, *Rusujo.*

**E**n Julio de la nuna jaro 1896 estos en Ĵenevo la dua ekzpozicio internacia por poŝtsignoj, aranĝita de la poŝtsignamanta ligo de Svisujo. Oni petas turni ĉiujn demandojn laŭ la adreso:

La direction internationale de timbrespote à Genève, Suisse.

## La Libro de la Esperantistoj.

Tiu ĉi verko, kiu redonas grandan multon da poezioj kaj kantoj el la plej bonaj tradukaĵoj kaj enhavas ankaŭ multajn originalajn verkajojn de la plej eminentaj inter la Esperantistaj skribantoj, estas tre bele ornamita libro kun bonega enhavo. La verkisto uzas kelkajn proprajn formojn kaj manierojn mallongigi precipe la kunrilatajn pronomojn kaj adverbojn, sed malgraŭ la tielaj "neesperantaj" ideoj — pardonu la esprimon — la libro estas entute tre bonega kaj rekomendinda. Tial ni havas la opinion, ke ĉiuj, kiuj amas nian lingvon, faras bone, aĉetante tiun ĉi libron (kies kosto estas 1 fr. 50 cent.). Oni povas ricevi ĝin ĉe la

**Klubo Esperantista en Uppsala.**

## La gazeton *Lingvo Internacia* oni abonas:

- en **Ameriko** ĉe R. Geoghegan, *Tacoma*, Washington, U. S. A.
- „ **Francujo** ĉe L. de Beaufront, *Epernay*, Marne.
- „ **Germanujo** ĉe W. H. Trompeter, *Schalke*, Westfalen.
- „ **Portugalujo** ĉe d-ro Costã e Almeida, *Rezende*.
- „ **Rusujo** ĉe V. Gernet, Remeslennaja 11, *Odessa*.

Ĉe tiuj ĉi sinjoroj oni mendas la gazeton kaj pagas al ili la abonpagon.

En aliaj landoj oni mendas la gazeton aŭ per la poŝto aŭ rekte ĉe la redakcio, adr. *Uppsala*. La monon oni plej bone alsendas per poŝta mandato.

Sinjoro, tute ne havanta ecojn de agrabla kunparolanto, ne interesa kaj maljuna, deziras fari en venonta somero velocipedan vojaĝon tra Finnuloj kaj Norvegujo. uzonte por tio ĉirkaŭ du semajnojn. Decidi tiun vojaĝon li povas nur en okazo, se iu el lokaj turistoj-esperantistoj volos etendi al li la manon de helpo, konsentante servi al li kiel kompaniano kaj kondukanto.

Estus dezirinde ligi la diritan ekskurson kun la afero de propagando Esperanta.

Bonaj animoj (necese esperantistaj), konsentaj akcepti la proponon, volu skribi\*) pri ĉiaj kondiĉoj kaj detaloj laŭ la adreso: *Russie*, Poltava, A. A. Zinoviev. Propra domo.

\*) Esperante, france, angle, germane, itale, ruse, aŭ pole.

En la venonta monato aŭgusto mi intencas vojaĝi tra Svisujo, vidi tie belajn altaĵojn. Dum la lasta parto de septembro mi intencas esti en Berlin vidi la tiean ekspozicion, nun ankoraŭ ne sciante en kiu semajno. — En la okazo, ke ia esperantisto intencas la saman, mi petas sciigon, ke ni skribe konsideru, ĉu ni povus vojaĝi komune dum pli-malpli longa tempo.

*V. H. Trompeter,*  
*Schalke, Westfalen.*

Depot' da semoj.

### M. I. Fedorovski

(Rusujo, Moskvo, Sadovaja, Krasnija vorota, domo Rauzer)

**vendas**

ekonomiajn, legomajn, florajn kaj aliajn semojn de la plej bona eco. La plena katalogo estas elsendata por 30 kopek en poŝtsignoj; al eksterrusaj aĉetantoj — *senpage*. La eksterrusaj mendoj estas akceptataj ankaŭ en la lingvo Esperanto.

## Amikoj esperantistoj!

Por atingi la gravan celon de vastigado de nia lingvo en mia urbo, mi invitas ĉiujn lokajn esperantistojn kunigi sian energian laboron por dissendado kaj disdonado de l' necesaj verkoj por Esperanta propagando.

Mi ankaŭ fervore petas ali-urbajn esperantistojn honori min per siaj korespondoj kaj konsiloj laŭ la sperto de esperanta propagando en iliaj urboj. Je tiela helpo mi sincere dankus.

**A. B. Fränckel,**

Tenejo de apoteka kaj parfumara vitraĵo  
Malij prospekt N:o 47  
Rostov, a. Don (Rusujo).

## Sinjoro E. Arduin

komercisto en *Bordeaux*, 11 rue *Turenne*, **Francujo**, deziras trovi ĉie agentojn por la maklera vendado de liaj ruĝaj aŭ blankaj vinoj kaj ankaŭ de liaj brandoj.

Li plezure sendos sian kostotabelon al la Esperantistoj petontaj lin pri tio ĉi. Li rekomendas al ili la bonan kvaliton de liaj vinoj, garantiataj pri natureco kaj vinbereco. Estos ankaŭ por li plezuro respondi kaj informi tiujn el niaj amikoj, kiuj dezirus proponi al li la makleran vendadon de l' produktoj de ilia industrio aŭ komerco.

Eliris el presejo N:o 87 de nia literaturo

## FANTOMOJ,

rakonto de *V. Korolenko*.

El lingvo rusa tradukis *V. Gernet*.

La verko kostas 0,90 fr. = 0,35 rub. (kun transendo 1 fr. = 0,40 rub.). La monon oni povas sendi en poŝtsignoj.

Oni povas ricevi la libron de la *Uppsala Esperantoförening*, de s-ro L. de Beaufront, de d-ro Zamenhof kaj de la tradukinto.